

LA ONDA de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2012

1

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2012. №1 (207)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, ALEN KRIS, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2012

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2012.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2012, №1 (207).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 12 декабря 2011 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de komitatano Z

Lingvaj dorsosakuloj

Antaŭ jardekoj Lapenna militis kontraŭ ekstremistoj, kiuj kompromitis la movadon antaŭ la ekstera mondo. La granda oratoro eĉ sukcesetis, kvankam unuopaj dorsosakuloj en mallongaj pantalonoj ne ĉesis trovi la vojon al urbaj akceptoj. Eĉ pli ol la nivelo de la ekstera sinmonro de la movadanoj al Lapenna gravis la nivelo de ilia argumentado kaj ne laste la lingva nivelo, eĉ la rego de la propra nacia lingvo. En la Principaro de Frostavallen Lapenna fiksitis en 1956 sian plu valoran kodekson pri informado kaj eĉ pri la ĝusta konduto.

La ideoj de Frostavallen pluvivas en la Gvidlinioj por Informado, kiun UEA represas en ĉiu Jarlibro. Tamen ne ĉiu legas sian Jarlibron, ekzemple la grupo, kiu sin nomas Pola Sekcio de EDE. Ĝiaj membroj fieras pri siaj kontaktoj kun polaj politikistoj, sed oni povas timi, ke la bildo pri Esperanto, kiun tiuj ĉi ricevis, ne estas tiu, kiun deziris Lapenna. La lingvaĵo en la sinlaŭdoj de la pola EDE estas fuŝa kaj laŭdire tiu de ĝiaj pollingvaj leteroj ne estas pli bona. Nenio stranga en tio. Ju pli verve iu reklamas Esperanton, des pli verŝajne temas pri iu, kiu mem ne bone regas la lingvon, kiun li trudis al aliaj. Propagandistoj emas ne kompreni, ke la plej bona reklamo por Esperanto estas tiuj, kiuj parolas ĝin perfekte.

Laŭ Trevor Steele la lingva nivelo en la aŭstralia movado estas pli alta ol antaŭ 100 jaroj. Li certe konas siajn homojn, sed lia konstato ne validas universale. Foliumante malnovajn revuojn oni bedaŭras ne nur la malaperon de multaj gloraj titoloj sed ankaŭ la lingvan falon. Feliĉe nia *LOdE* zorgas pri si ankaŭ lingve, sed la revuon de UEA oni ne povas trankvile doni en ĉies manojn. Tamen ĝia redaktoro estas akademiano, sed en la supera lingva institucio oni trovas nek Mark Fettes nek István Ertl, dum kies periodoj *Esperanto* estis ankaŭ lingve modela. Lingva fuŝulo Stano Marček certe ne estas, sed pri la neglataĵoj en lia revuo kulpas la multe kritikata manko de redaktado. Verki lernolibrojn eble postulas tro da tempo de la redaktoro. Dorsosakuloj tamen ne mankas en la Akademio de Esperanto kaj simplaj samideanoj kun plezuro ridas pri lingvaj bonzoj, kiuj regas akuzativon malpli bone ol ili, kaj nenio pli ol tio subfosas la reputacion de la Akademio.

Jam de unu kaj duona jaroj laborgrupo preparas strategian planon por UEA, sed ĝis nun oni nenion aŭdis pri ĝi. Nenio miriga en tio sed jes en tio, ke oni metis kune la serioze pensantan Mark Fettes, la populiston Renato Corsetti kaj ties ardan kritikanton José Vergara. Ili ne povus naski paperon, kiu ne estus miŝmaŝa kunfliktaĵo kaj same nekohera kiel numero de la Oficiala Organo. Feliĉe tio ne multe damaĝos, ĉar ankaŭ la malnovan planon neniu rigardis post la akcepto. Bona plano tamen povus esti utila — nur necesus, ke verku ĝin unu homo, prefere Fettes. Inter ĝiaj prioritatoj ne manku la plialtigo de la lingva nivelo de la verda popolo. UEA mem denove estu modelo ankaŭ lingve, komencante de ĝiaj revuoj kaj estraro.

Komitatano Z

Sur la kovropaĝo estas la Esperantisto de la Jaro 2011, Dennis Keefe, kiu instruas ne nur Esperanton.

Esperanto 125-jara – okazo por ne maltrafi!

La 26an de julio 2012 okazos la 125-jara jubileo de Esperanto — la apero de ĝia Unua Libro. Jen okazo por ekspluati — per varb-kampanjoj kaj oferto de modern-stilaj kursoj. Kelkaj landoj formulis planojn kaj starigis jubileajn teamojn. Sed ĝis nun ne videblas internaciaj elpaŝoj.

ILEI ekde septembro 2010 provis preni gvidan rolon en tio — vidu la revuon *Esperanto* de aprilo 2011. ILEI strebas nun transdoni la organizan flankon de la projekto al aliaj, por koncentri siajn magrajn fortojn al la pedagogiaj ebloj de la jubileo.

ILEI kaj jubileemuloj nun kompilas kaj akceptigas malgrandan internacian liverteamon por kunordigi la landajn agadojn. Ĝia nuna konsisto inkluzivas reprezentantojn el tri kontinentoj — kaj de ILEI. La teamo komencas arigi raportojn de landaj planoj: ekzistas projektoj, komisiito aŭ prepargrupo en pluraj landoj — i.a. Britio, Germanio, Hispanio, Italio, Japanio kaj Kubo, sendube ankaŭ en pliaj. La teamo diskonigos plie landajn planojn, kaj pretigos konsilarojn pri la ebloj konigi la jubileon kaj oferti kursojn al pli vasta publiko. La dekomenca ideo de ILEI estas oferti kursojn kun 125



Kelkaj estraranoj de ILEI en Kopenhago (Fotis Trezoro)

partoj plenumebraj rete tra la 125 tagoj antaŭ la jubileo, do inter la 23a de marto kaj la 26a de julio. ILEI laboras krei tian 125-etapan kurson. Jen la esencaj trajtoj de tiu kurso:

- Ĝi estos nur cel-lingva kaj kiom eble memklariga.
- Humuro ludu esencan rolon en la kurso por teni la intereson de lernantoj.
- Ĝi uzu maksimume situaciojn kun realismaj, praktike uzeblaj frazoj.

— Ĝiaj situacioj estu allogaj por la celatoj — junuloj en komputika kaj konektita mondo. Tamen la kurso konvenu al homoj de ajna aĝo (ekde la 10-jaraj!).

— La kurso baziĝu sur originala didaktika ŝtuparo, bazita sur la unikaj kvalitoj de la lingvo. Sekve, ĝi estos tre verbo-centra kun atento al la transitiveco de la verboj.

— Ĝi ne timu prezenti eksplicite gramatikon — sed en alloga maniero, kiu ne regos super la situacioj.

— La gramatikaj klarigoj uzu nur tiajn lingvajn elementojn, kiuj estas jam prezentitaj.

— La situacioj fariĝu ĉiam pli variaj, transkulturaj kaj inkluzivu erojn pri la Esperanta vivo.

La kurso enhavu son- kaj film-materialon — pri tio ni serĉas kunlaborantojn, ankaŭ por la defia tasko transigi la materialon al la reta HTML-formato.

Landaj Asocioj de UEA kaj Landaj Sekcioj de ILEI povos ludi aktivan rolon en la jubileo. ILEI delonge (ekde septembro 2010) dissendadis peton al tiuj, ke ili nomumu reprezentanton por ligi la naciajn kaj internaciajn planojn. Asocioj kaj sekcioj povas starigi projekt-teamojn por prepari kampanjojn. Agadterenoj inkluzivas kontaktadon kun ĵurnalistoj, starigon de reklam-kampanjoj, kaj adapton de ekzistantaj kursoj por jubilea uzo kaj esploron kiel la internacia kurso de ILEI estu uzebla enlande.

Ni laboregas, ke baldaŭ ekzistu internaciaj retejoj pri la jubileaj preparoj, kune kun proponebla kurso-materialo.

Stefan MacGill
prezidanto de ILEI

Dennis Keefe – la Esperantisto de la Jaro 2011



La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Baker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korjenkov (2009), Katalin Kováts (2010).

En ĉi tiu jaro 16 kandidatigantoj proponis 19 kandidatojn, al kiuj 15 elektantoj jene donis la voĉojn:

Dennis Keefe	12 voĉoj
Hori Yasuo	4 voĉoj
Peter Baláž	3 voĉoj
Stefan MacGill, Perla Martinelli, Floréal Martorell	2 voĉoj

Tri kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Dennis Keefe, 60-jara usona instruisto, nun en la universitato en Nankino (Ĉinio), internacie konata iniciatinto de Lingvaj Festivaloj, estas proklamita *la Esperantisto de la Jaro 2011* pro la universitat-nivela disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj pro la evoluigo de la projekto “Esperanto-Insulo” en Hajnano.

En la februara kajero de *La Ondo de Esperanto* aperos la listoj de la proponantoj kaj elektantoj kaj intervjuo kun **Dennis Keefe**, kiun ni kore gratulas okaze de la elekto kiel la Esperantisto de la Jaro 2011.

Halina Gorecka, sekretario

Italio: EU-subvencio

17 nov 2011 la Itala Agentejo de la Programo de Tutviva Lernado komunikis la aprobon de la seminario Grundtvig, proponita de la Itala Instituto de Esperanto (IIE), kun la temo “Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof”.

La seminario okazos 18–25 aŭg 2012 en la sicila urbo Mazaradelvalo, kadre de la 79a Kongreso de Esperanto en Italio. Ĝi estos financita per 36 mil 120 eŭroj, kaj ĝi analizos la aktualecon de la pensado de Zamenhof, kun granda atento al multkulturismo kaj al pluretna mondo, kun rektaj ligoj al Esperanto-spertoj.

Denove ĝojiga sukceso por *Kosmo*, esperantista entrepreno kiu prizorgis la pretigon de la projektpropono, kunlaboro kun IIE. “Per tiu ĉi plia sukceso ni pli proksimiĝas al la ronda cifero de 200.000 eŭroj akiritaj por Esperanto-agado”, — komentis Bruĉjo Kasini, kundirektoro de *Kosmo* kaj jam konata esperantisto ankaŭ per la eldonejo *Edi-studio*. Prof. Fabrizio A. Pennacchietti, prezidanto de IIE, komentis: “Tiu ĉi sukceso montras, ke Esperanto-organizoj havas la eblecon akiri subvenciojn por financi siajn agadojn. Ĝi estas rekono de la plurjara agado de IIE en la kampo de plenkreska edukado. Ni atendas vin en Mazaradelvalo!”

Kosmo Strategio Ltd. estas skota esperantista entrepreno, kiu celas helpi la Esperanto-mondon akiri subvenciojn, mastrumi projektojn, plani agadojn. Oficiale registrita en aprilo 2011, ĝi havas kvar kunlaborantojn kaj havas rilatojn kun dekoj da organizoj, universitatoj kaj malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj — ne nur esperantistaj. La lastan monaton ĝi lanĉis partneran projekton inter Svisa Esperanto-Societo, Kataluna Esperanto-Asocio, Germana Esperanto-Asocio kaj Esperanto-France, financitan per 69 mil eŭroj.

“Mi estas tre feliĉa ne nur kiel entreprenisto, sed ĉefe kiel esperantisto! La kongreso en Mazaradelvalo estos granda ŝanco por relanĉi la Esperanto-movadon en Sicilio, kun favora subteno de la urbaj instancoj. Tiu ĉi subvencio certe helpos”, — aldonis Francesco Maurelli, kundirektoro de *Kosmo*.

Francesco Maurelli



RIO+20
Conferência das
Nações Unidas
sobre
Desenvolvimento
Sustentável

UEA kaj TEJO prepare al RIO+20

Neregistaraj organizaĵoj (NRO) havos gravan rolon en Rio+20, la konferenco pri daŭripova evoluo, kiun UN okazigos en Rio-de-Ĵanejro 20–22 jun 2012. Kiel reprezentantoj de la civila socio, NROj estis petitaj kontribui per proponoj al la deklaro aprobita de la konferenco.

UEA kaj TEJO estas aktivaj sur la “vojo al Rio”. La unua paŝo estis farita jam septembre en Bonn, kie kvinpersona delegitaro de UEA sukcesis akceptigi amendon en la projekto de la 64a NRO-konferenco de UN favore al lingvaj rajtoj kaj kultura diverseco, kun propono konsideri la potencialon de neŭtrala internacia lingvo.

Agema interreta teamo redaktis la komunan proponon de UEA kaj TEJO. La teamo konsistis el la TEJO-aktivuloj Veronika Poór kaj Nico Huurman, la loka kunordiganto Ursula Grattapaglia, kaj la estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj Stefano Keller. La dokumento estis ĝustatempe submetita al UN kaj aperis en la retejo de UN kreita por la konferenco.

Enkonduke UEA kaj TEJO atentigas, ke la konferenca dokumento estos adresita al la tutmonda komunumo, pro kio ĝi devus “klare kondamni lingvan diskriminacion kaj politikojn kiuj kondukos al morto de lingvoj kaj al kultura superrego de pli grandaj lingvoj super malpli grandaj lingvoj”. La du organizaĵoj memorigas pri la deklaro de la konferenco en Bonn, emfazante la punktojn, kiujn UEA sukcesis aldonigi al ĝi. Ankaŭ la rolo de Esperanto kiel pontolingvo estis menciita per rememorigo pri la dokumento *Etika sindevontigo de la NROj por tutmondaj sinteno kaj konduto*, aprobita de la unua simila konferenco en Rio-de-Ĵanejro en 1992. Ĝia 14-a punkto proponis la enkondukon de Esperanto en la internacia komunikado kaj alvokis NROjn partopreni en ĝia disvastigo.

Fine de sia kontribuo UEA kaj TEJO skizas, kiel la transiro al la lingva politiko proponita de ili povus esti realigita en la UN-sistemo, en aliaj internaciaj organizaĵoj kaj en unuopaj landoj.

GK UEA

Malferma Tago: Omaĝo al Sekelj

La 35a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 26an de novembro allogis 70 vizitantojn el 11 landoj. La ĉefprelegon faris Spomenka Štimec pri la vivo de la mondvojaĝanto, ĵurnalisto, verkisto kaj movada aganto Tibor Sekelj (1912–1988). La 14an de februaro pasos 100 jaroj de post lia naskiĝo, pro kio Eŭropa Esperanto-Unio deklaris la jaron 2012 Jaro de Tibor Sekelj kaj ankaŭ la Komitato de UEA rekomendis priatenti la datrevenon. La prelego de Štimec estis kvazaŭ enkonduko al la jaro.

En sia alia kontribuo Spomenka Štimec, unu el la plej konataj nuntempaj Esperanto-aŭtoroj, parolis pri sia verkista agado. D-ro Ziko van Dijk, prezidanto de Wikimedia Nederland, parolis pri la libera reta enciklopedio Vikipedio. Krome, deko da interesitoj revenis al la Centra Oficejo en la posta tago por la seminario “Libera scio: kulturo de disdonado”. Ili konatiĝis kun la filozofio malantaŭ Vikipedio kaj ricevis trejnadon ne nur pri ĝia uzado sed ankaŭ pri tio, kiel mem kontribui al ĝia enhavo. La seminarion gvidis Ziko van Dijk kaj la Vikipedia aktivulo Marek Blahuš.

En la programo estis ankaŭ du filmoj. La unua, *Vojaĝo al Marseille*, estas 45-minuta dokumento produktita de *Esperanto-Filmo Germanujo* pri la partopreno de la germana esperantistino Injo en la Universala Kongreso en Marsejlo en 1957. La filmo enhavas ankaŭ fragmenton pri la UK en Kopenhago en la antaŭa jaro. Biblioteko Hodler ricevis la filmon siatempe donace de Joachim Giessner, unu el ĝiaj aŭtoroj, kaj UEA ciferecigis ĝin lastatempe. Parte en UK-oj estis farita ankaŭ *The Universal Language* (La Universala Lingvo) de la usona reĝisoro Sam Green.

La Malferman Tagon finis tradicie la programero “Estraranoj respondas”, dum kiu vicprezidanto Claude Nourmont, ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak kaj estrarano Loes Demmendaal respondis demandojn. La libroservo estis bone vizitata kaj ĝiaj vendoj sumiĝis je 2176 eŭroj. Apud verkoj de Sekelj kaj Štimec plej multe vendiĝis la tute nova disko *Amindaj* de la samnoma kuba muzikgrupo kaj la ĵus aperinta numero 12 de *Beletra Almanako*.

La sekva Malferma Tago okazos sabaton, la 28an de aprilo 2012 kaj estos dediĉita al la 50-jara funkciado de la Centra Oficejo en la domo ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo.

GK UEA

UEA en Afrika kongreso

Nome de la Afrika Komisiono de UEA mi partoprenis la Unuan Tutafrikan Kongreson pri la temo “Kulturo, ilo por evoluo en Afriko” la 17–18-an de novembro en Lomeo (Togolando).

Centoj da homoj el preskaŭ ĉiuj Afrikaj landoj ĉeestis la kongreson, kiun malfermis la nuna ministro pri artoj kaj kulturo, Yacoubou Koumadjo Hamadou. La konkludoj estos prezentitaj al politikaj decidantoj de Afrikaj landoj, al Afrika Unio kaj al diversaj institucioj.

Okazis prelegoj kaj atelieroj, i.a. pri vivantaj spektakloj, eldonado/distributoretoj, modo, belartoj kaj bildarto/komunikado. En la lasta, kiun prezidis la ministro Cornélius Aidam, mi intervenis, kiam leviĝis la problemoj pri harmoniigo de rilatoj inter kulturaj agantoj en Afriko. Mi proponis Esperanton por kontaktlingvo inter afrikanoj kaj inter Afriko kaj la cetera mondo, sed ĝi ne eniris la finan deklaron de la kongreso.

Kun helpo de Kouevigan Koffi, eksa sekretario de la landa Esperanto-asocio en Togolando, mi disdonis centojn da varbiloj al kongresanoj kaj kun kelkaj el ili vigle diskutis pri Esperanto.

Ĉar revu unufoje estas simpla revo, sed revu dufoje estas komenco de la realigado, la Afrika Komisiono ĉiam pli decide intencas partopreni en tiaj aranĝoj por disvastigi Esperanton en la tuta Afriko. Tion ni povos fari nur helpe de donacoj al Fondaĵo Afriko de UEA.

Adjé Adjévi

Kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA

REU informas

Georgij Kokolija, kiu dum multaj sinsekvaj jaroj estis komisiito de REU pri retlistoj ĉe yahoogroups (reu-agado kaj esperanto-rus-informoj) ne plu okupas tiun postenon, kvankam la oktobra konferenco konfirmis lian komisiitecon. La kaŭzo estas rekonceptado de la retlistoj, pro kio Georgij bonvole transdonis la moderigajn rajtojn al mi kiel al la prezidanto de la landa asocio.

Krome la Estraro de REU decidis liberigi sinjoron Kokolija ankaŭ de la kompilado de la *Bulteno de REU*, kion li faris nur pro tio, ke fakte mankis koncerne homo en la Estraro, kiu okupiĝus pri tio. Provizore la *Bulteno* kunredaktos mi kaj Arina Osipova, la estrarano de REU pri regiona agado.

Grigorij Arosev
prezidanto de REU



La partoprenantoj kolektiĝas antaŭ la kastelo de Bückeburg. (Fotis Heinz Sprick)

Bückeburg valoras vojaĝon

Kien vojaĝas esperantistoj? La respondo plej ofte estas: “Al foraj landoj”, ĉar en la mondo regule kunvenas amikoj, kiuj parolas Esperanton. Sed ne ĉiam la celo devas esti malproksima. Pli ol 30 Esperanto-parolantoj el la nordgermana regiono vojaĝis la 5an de novembro al Bückeburg, kien venis ankaŭ dek koreaj lernantoj, gastoj de la Esperanto-urbo Herzberg.

Ĉiuj estis invititaj de la Hameln-a Esperanto-grupo *La Ratkaptista Bando* por la 8a Rata Rendevuo. Dum ĝi oni ofte povis aŭdi “Bückeburg estas bela urbo”. Ne nur la urbo Bückeburg kaj la kastelo, sed ankaŭ la programo, organizita de Heinz Sprick, la prezidanto de la Hameln-a grupo, tre plaĉis al la partoprenantoj.

La ĉiĉeronado tra la kastelo montris la vivon kaj la arton de la pasintaj jarcentoj. Kiel “bonega” la esperantistoj taksis ankaŭ la gastronomian arton en restoracio en la malnova urbocentro. Antaŭ, dum kaj post la tagmanĝo oni parolis pri siaj impresoj. Sen Esperanto tio ne estintus ebla, ĉar ankaŭ la koreaj gejunuloj volis kunparoli. Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar el la Esperanto-urbo Herzberg raportis pri siaj laboroj kaj la planoj de la Esperanto-centro.

Ankoraŭ longe la gastoj rememoros la artajn prezentadojn en la princa korta rajdlernejo, la viziton de la korta ĉevala muzeo kaj la komunan kafotrinkadon en la malnova urbocentro posttagmeze.

Klaus Santozki

Sarlando: Jam la 65a KS

La 65a Kultura Semajnfino de la Sarlanda Esperanto-Ligo okazis 28–30 okt 2011 en la urbeto Homburg kun pli ol 30 partoprenantoj el Germanio, Francio, Luksemburgio kaj ankaŭ hungar-, tajland-, japan- kaj ĉindevenaj gastoj.

Estis por ni ankaŭ tre granda honoro la aktiva partopreno de la vicprezidantino de UEA Claude Nourmont, Brian Moon de la Akademio de Esperanto, kaj la prezidanto de la nova partio “Unu Mondo”, d-ro Ulrich Matthias.

Ĉeestis ankaŭ preskaŭ la tuta estraro de Eŭropo-Demokratio-Esperanto, sinjoroj Konrad Gramelspacher kaj d-ro Eugen Macko. Pastoro Albrecht Kronenberger invitis al diservo kaj la fama Esperanto-vinkultivisto Anton Kiefer invitis nin vespere al vingustumado.

La programo renkontis grandan intereson. Krom diskutoj pri Esperanto, kiel Eŭropa helplingvo, la prelegoj temis pri Vjetnamio, la venontjara kongreslando. Prof. d-ro Markus Groß enkondukis nin al la vjetnama lingvo kaj Edgar Müller parolis pri la historio kaj la geografio de la lando. Kiu matene aŭskultis atente, tiuj vespere havis bonan ŝancon gajni premion en la kvizo. En la vespera programo sinjorino Müller prezentis tre rarajn muzikilojn el Ĉinio kaj ludis kelkajn muzikpecojn.

La seminarejo en Kardinal-Wendel-Haus estis tre taŭga por semajnfinaj aranĝoj. La programo por plenkreskuloj kaj infanoj estis tre varia kaj interesa.

Luise Wenig, Oliver Walz



La urbestrieno Conxita Campoy i Marti alparolas la patroprenantojn de la 19a Semajno.

Semajno en ĝuinda etoso

Al la 19a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Premia de Mar (Katalunio, Hispanio) aliĝis 145 samideanoj, el kiuj 131 ĉeestis.

La Semajno komenciĝis 1 okt, sabate, per malfermo de la libroservo kaj Esperanto-kurso de Stano Marček, kaj post la 22a horo ni ĝuis la interkonan vesperon, kie ne mankis bona humoro, frandaĵoj, kaj ĉampano Esperanto. Ĉi tiun vesperon ni ripetis merkrede.

Dimanĉe la Semajno estis inaŭgurita en la ĉeesto de la urbestrieno, Conxita Campoy i Marti, kiu en sia salutparolo diris: “nepre daŭrigu vian lukton por solvi la lingvan problemon, kiun mi bone konas, ĉar urbestro de turisma urbo”. Oni anoncis, ke la premio Ada Sikorska ĉi-jare estas aljuĝita al Eugène de Zilah.

La serion de prelegoj komencis gedzoj Michel-Hubbert el Belgujo, kiuj por festi sian esperantistiĝon realigis kvinmilkilometran vojaĝon tra nordaj landoj. La kataluna ĝardenisto Guillen Nicolas instruis, kiel grimpi al arbpinto por tondi branĉojn — ne facila tasko, kiu en iuj aspektoj similas montgrimpadon.

Pere Navarro-Rosinés, profesoro pri biologio en la Universitato de Barcelono, malkovris al ni tiun fakon, klasifikante kaj donante konkretajn nomojn al diversaj vivajoj. Tiu galimatio de nomoj ne estas facile komprenebla por ne fakulo.

Eddy Rats (Belgujo) prezentis al ni la agadon de la Monda Asembleo Socia kaj konigis la gigantan laboron de Vilhelmo Lutermano, inkluzive de la traduko de *Le Monde Diplomatique* al Esperanto.

Alia belga samideano Eduardo Kuster parolis pri la historio de Belgujo, sen forgesi la lingvan ĥaŝon en ĝi.

Bouchet Rémy (Francio) translokis nin per siaj fotoj al Laoso. Li multe raportis pri tiu lando, ĝiaj problemoj, multaj el ili pro la Vjetnama milito. Dieter Rooke, nome de la Esperanta Civito, en bonhumora formo klarigis al ni, el kio konsistas la Esperanta Civito.

Ĉiujare estas debato pri Esperanto. Nun la temo estis “Ĉu Esperanto estas lingvo artefarita”. La temo vekis grandan diskuton, iuj opiniis, ke ĉio en la vivo estas artefarita inkluzive de la naturo eĉ la lingvoj, la homo nur transformas la materion, do la naturon. Aliaj opiniis, ke se la lingvoj, franca, angla, ĉina, hispana kaj aliaj estas naturaj, ankaŭ Esperanto estas natura lingvo.

Unu el niaj tri ekskursoj ni dediĉis por viziti en la urbo Sabadell la avenuon Esperanto, eble la plej malnova en la mondo, inaŭgurita en 1912, kaj la majestran 14-metran Esperanto-monumenton. Joan Manau, magistratano de Sabadell kaj denaska esperantisto, metis florbukedon ĉe la monumento. Ni ankaŭ omaĝis s-anon Ludoviko Mimoo, la fondinton de la Analiza Skolo, en loka strato dediĉita al li.

Kaj mi ne volas forgesi la folkloran vesperon, kie muzika ensemblo amuzis nin, dum ni dancadis kaj trinkadis la faman “cremat”, kiu estis servata en specialaj bakitaj tasetoj.

Sed la plej ŝatata estis la ĝuinda etoso, pro kiu la tuta Semajno ŝajnis familia renkontiĝo, ĉar iuj jam de multaj jaroj venas al ĉi tiu modesta Esperanta evento. Sen problemoj de ekonomio aŭ financo, kaj sen la ofte ĝena tasko elekti estraron, la partoprenantoj restis tute liberaj por aŭskulti prelegojn aŭ iri al la strando.

Luis Serrano Pérez

La unua Zamenhof-Festo en 2011

Trafika ĥaŝo regis tra la centra Skotlando. Ne-kutima tutmatene neĝofalo haltigis la plejmulton de veturiloj sur la skotaj vojoj kaj ŝoseoj. Homoj sukcesis atingi siajn laborejojn peraŭte, sed nur minoritato sukcesis sammaniere reveni hejmen. Centoj devis pasigi la nokton en siaj aŭtoj. La klimato skota pli mildas ol tiu en Eŭropo pro la apudeco de Atlantiko kaj la Gofa Fluo. Konsekvence, tiomkvanta neĝoŝuto estis ne atendita. Tamen la Ministro de Transporto deposteniĝis!

Pro timo ke homoj, kvin tagojn poste, alvojaĝinte de foraj skotaj urboj ne povos reiri hejmen, oni nuligis la skotan Zamenhof-Feston pasintjare. Ĉi-jare oni decidis okazigi ĝin en novembro, la 26an, pro timo pri nenula probableco ke trafos nin same eksterordinara decembra vetero.

La komitato de Esperanto-Asocio de Skotlando kunvenis matene en la plaĉa hotelo *Bentley*, en Motherwell. Inter aliaj aferoj ni diskutis la Kunkongreson de la Esperanto-Asocioj Brita kaj Skota, kiu okazos en aprilo 2012 en Edinburgo (vidu ĉe <http://britakongreso.org>).

La aliaj asocioj alvenis por kunlunĉi en la hotelo *Bentley*. Post bongusta manĝo ni rekunvenis en halo de la apuda preĝejo de Sankta Triunuo. David Bisset parolis pri Danlando, Kopenhago, kaj ligoj de Danlando kun Zamenhof. Sekvis lin Ed Robertson, kiu tre interese parolis pri la skandinavaj lingvoj, ties influo al la angla lingvo kaj ankaŭ al Esperanto. Post tranĉo de kuko, tosto per vino, kaj manĝeto, finiĝis la evento.

Hju Rid

Koreaj lernejoj en Herzberg

Ok koreaj lernantoj pasigas en novembro kaj decembro kvin semajnojn en Herzberg am Harz — la Esperantourbo. Ilin akompanas geinstruistoj Songanta kaj Suno. La urbestro Gerhard Walter renkontis la grupon sur la ĉefplaco, dum urborigardado, kiun gvidis Ewa Kukielka kaj Ida Havasi.

La koreoj prezentis sian lernejon, ludis muzikon, kantis kaj dancis en la Herzberga meza lernejo. Grandan aplaŭdon ricevis la tamburisto Aram kaj la sporteca korea danco “Teggen”, kiun ili dancis en tradiciaj vestaĵoj.

La korea grupo faris unutagan viziton al Erfurt, kie ĝi estis akceptita en la Evangelia Konsilantargimnazio.

ICH

Prilingvaj debatoj ĉe kafo

Slovakio profitos de multkultureco! Oni malpermesu ŝuldon! Savado de ekonomioj de EU-membroŝtatoj estas detrua! Nia mondo paŝas al (mal)libereco! — Jen nur kelkaj el la tezoj diskutataj dum “debatoj ĉe kafo”, kiujn organizas Eŭropa Komisiono. En ĉiu debato prezentas sian opinion du fakuloj — la tasko de unu el ili estas defendi la tezon, la oponento strebas malkonfirmi ĝin. Sperta gvidanto de la diskuto donas spacon ankaŭ por opinioj de publiko.

En decembro 2011 okazas kvin debatoj en kvin slovakiaj urboj kun la tezo “La angla kiel oficiala lingvo de EU sufiĉas!” La celo de la debatoj estas strebi serĉi kaj trovi respondojn al demandoj pri la nuna lingva sistemo en la Eŭropa komunumo. Slovakaj esperantistoj estis invitataj partopreni kiel oponentoj de la tezo. Rastislav Šarišský, vicprezidanto de Slovakia Esperanta Federacio, akceptis la inviton por la unua duelo, kiu okazis la 6an de decembro en Bratislavo.

Kontraŭ li sidiĝis Peter Bojo, kies tasko estis defendi la anglan en la rolo de la sola oficiala lingvo de EU. Ĉeestis ĉ. 50 homoj, inter ili kelkaj esperantistoj. La parolantoj ricevis po dek minutojn. Poste la gvidanto kompletigis la prezenton per demandoj. Komenciĝis diskutado inter la oponentoj, publiko rajtis starigi demandojn kaj prezenti sian opinion. Peter Novotníček, la ĉefredaktoro de la revuo *Esperantisto Slovaka*, rakontas:

“Unu el la argumentoj por la angla estis tio, ke jam nun la lingvo funkcias kiel *monda* lingvo, kaj multaj studoj, disertacioj ktp. estas verkataj en la angla. Sed laŭ la ĝenerala etoso reginta en la ejo ŝajnis, ke homoj preferas serĉi aliajn solvojn de la lingva problemo. Rastislav prezentis Esperanton kiel neŭtralan pontan lingvon kaj proponis instrui al infanoj unue dum du jaroj Esperanton kaj poste ajnan lingvon laŭplaĉe. Alia sinjoro el publiko proponis la latinan kiel komunan lingvon, kaj argumentis per ĝia precizeco. Evidentiĝis ke pluraj ĉeestantoj ne estus kontraŭ Esperanto en la funkcio de komuna lingvo, sed ili timis, ĉu ĝi estas jam sufiĉe evoluita por plenumi ĉiujn komunikajn bezonojn. Ne plaĉis al ili perforta penetrado de la anglaj kulturo kaj vivmaniero en nian vivon, ĉar ĝuste tion alportas al ni la deviga angla”.

Al la diskutado kontribuis la juna esperantistino Eva Fitzelová. Ŝi trafe



atentigis, ke dum ni volas lerni la anglan (ĉar ni slovakoj ĉiam deziras ekplaĉi al la politike “pli forta” nacio), multaj angloparolantoj komencas lerni la ĉinan. Kaj kion faru ni, slovakoj, kiam ŝanĝiĝos la monda politika situacio kaj ni estos devigataj lerni la ĉinan? Ĉu ne ripetiĝos la situacio pri la rusa lingvo, kiun niaj gepatroj estis devigataj lerni kaj nun ĝi estas por ili senutila? Pro sia trafa kontribuo ŝi ricevis de organizantoj donacon, belan tason.

La defendanto de la tezo Peter Bojo reagis per aserto ke ne estas problemo interkompreniĝi en Ĉinio per la angla. Tiam Šarišský tralegis al ĉiuj mesaĝon de Petro Baláž, kiu nuntempe estas en Ĉinio:

“Mi estas nuntempe en Ĉinio kaj la anglan parolas ĉi tie eble unu homo el miliono (simile mi spertis en Japanio). Se mi ne estus ĉi tie kun Shanshan el la Esperanto-redakcio de la Ĉina Radio Internacia, mi estus perdita, eĉ se mi regus 1000 lingvojn”.

Ĉu oni venis al konkludo? Oni interkonsentis, ke la angla sufiĉe multe influas nian kulturon, kaj pro tio eble estus pli bone havi neŭtralan pontan lingvon. Tamen Esperanto ankoraŭ ne estas en la konscienco de la slovakoj kiel evoluita, matura lingvo. Estas defio por ni, pli multe koncentriĝi pri tiu ĉi kampo dum prezentado de Esperanto.

Dum la sekvaj dueloj ni povos denove vidi esperantistojn kiel oponentojn de la tezo, ekz. Jozef Reinvart en Trenčín kaj Stano Marček en Banská Bystrica.

Katarína Nosková



Kvardek aktivuloj en Dresdno

En mojosa etoso pasis Aktivula Renkontiĝo 28–30 okt en Dresdno. Organizis ĝin Germana Esperanto-Junularo kaj partoprenis ĝin kvardek aktivaj gejunuloj el Germanio, Ĉeĥio, Pollando, Britio kaj Hungario.

La ĉefa tago estis sabato. Antaŭtagmeze Lu Wunsch-Rolshoven konatigis la ĉeestantojn kun tio, kiel efike organizi renkontiĝon. Posttagmeze Rolf Fantom organizis laborgrupon, en kiu li emfazis, ke necesas, ke la aranĝoj estu taŭgaj ankaŭ por novuloj en la Esperantomovado. Dimanĉe prelegis Julia Hell pri fortaj kaj malfortaj lokoj en Esperanto-asocioj — kaj kiel solvi ilin.

Memkompreneble oni ne nur laboris. Leo Sakaguchi preparis malgrandan diskotekon, kaj ĉiuvespere oni grupe promenis en historia urbocentro kaj serĉis drinkejon (trovi taŭgan drinkejon por kvardek personoj ne facilas). Oni povis ankaŭ ludi kartojn aŭ aliajn tabul-ludojn. Do, post la tago plena de laboro oni povis bone ripozi, amuziĝi kaj precipe amikiĝi.

Laŭ *TEJO Tutmonde*

Peresperanta pupekspozicio

Kun ĉeesto de la urbestro kaj ĉefaj japanaj amaskomunikiloj (NHK, *Yomiuri*, *Asahi*, *Nihon Keizai* k. a.) 1 okt 2011 estis inaŭgurita “Monda Pupekspozicio per Esperanto” en la sidejo de la Nova Turisma Asocio en la urbo Higashikagawa.

Etsuo Miyoshi, la prezidanto de la Asocio, en la inaŭgura parolado emfazis, ke la ekspozicio klare montras la gravecon de kulturaj interŝanĝoj. La ambasadorino de Pollando, Jadwiga Maria Rodowicz-Czechowska, asertis, ke la ekspozicio “certe estos sukcesa kaj kontribuos al la daŭra interpopola interkompreniĝo”.

630 pupoj el 22 landoj estis montrataj dum dek tagoj. Unu el la plej valoraj kontribuoj estis farita de Vladka Chvatálová, kiu kolektis 52 pupojn en Benino, Ganao kaj Togolando. Dum la ekspozicia periodo okazis tri atelieroj pri marionetfarado kaj ombroludado.

Ekstere la gastoj estis bonvenigataj de 22 flagoj kaj interne apud kartona terglobo troviĝis Esperanto-flago por montri, ke la kolekto estis farita danke al Esperanto-parolantoj. Proksimume 10 mil homoj vizitis la eventon.

Laŭ *Eŭropa Bulteno*

Sur la foto: Pupoj el Benino.

IKEF-China 2011

29-30 okt 2011 en Hangzhou, la ĉefurbo de la provinco Zhejiang, okazis IKEF-China 2011 — la 5a Jarkunveno de ĉinaj esperantistoj-komercistoj kun 42 partoprenantoj, el kiuj 26 estis oficialaj delegitoj de kompanioj kaj entreprenoj inkluzive de eksterlandaj kompanioj el Brazilo, Hispanio, Irano kaj Italio. La programon reĝisoris Zhao Chenghua, vicprezidanto de Klubo de Ĉinaj Esperantistoj-Komercistoj (KĈEK).


Ĉi-foje la jarkunveno ne estas tiel pompa, kiel pasint-jare en Huangshi; ĝi pasis en komerca atmosfero, kun multaj reklamoj en la kunvenejo kaj eĉ sur la podio. Tia aranĝo plaĉis al ĉiuj partoprenantoj, kiuj argumentis, ke fakkunveno de esperantistoj povas aspekti kiel normala fakkunveno, sed ne esperantista renkontiĝo.

La jar-raporton prezentis Ĉielismo (Wang Tianyi), ĉina peranto kaj estrarano de IKEF kaj prezidanto de KĈEK. Laŭ la raporto, ĉinaj E-komercistoj gajnis novajn sukcesojn. Ekzemple, Xi'an Da Vinci Importa-Eksporta Kompanio kunlaboras kun Da Vinci Ltda (Brazilo) kaj eksportas averaĝe 20 kontenerojn monate — la negocado okazas per Esperanto. *Xiamen Chine Ko* regule importas italajn vinojn pere de Esperanto, eĉ la markon *Saluton*, kiu estis sur la manĝotablo de ĉiu partoprenanto, kaj kelkaj el ĉinaj komercistoj decidis ankaŭ disvendi la vinon *Saluton* ktp.

Jose Franquesa rakontis pri sia komerco per Esperanto, kiu komenciĝis antaŭ 46 jaroj, kiam li ekimportis varojn de japana E-komercisto. Kaj nun li importas hidraŭlikajn tubojn jarojn pere de ĉina E-komercisto. Zhang Tiezheng rakontis pri sia peresperanta sperto de servado al Suzhou Lotusa Matracejo, kie li respondecas pri internacia merkato. La irana komercisto Saed Abbasi rakontis pri malfacila internacia komerco en Irano pro la ekonomia blokado de Usono kaj invitis al kunlaboro esperantistajn komercistojn, Aldreno Speck el la Brazila kompanio Da Vinci Ltda rakontis, ke li jam du jarojn laboras per Esperanto ĉe Ĉielismo.

IKEF-China 2012 okazos en la urbo Changsha, laŭ invito de Li Zong, direktoro de Hunan-a Internacia Transporta Kompanio XB kaj prezidanto de Changsha Esperanto-Asocio. Interalie, tie Esperanton lernas 200 studentoj de Changsha Profesia Komerca-Turisma Altlernejo.

Ĉielismo



Xiaojuan instruas BEK-Kurson en Hajnano.

Esperanto-Insulo atendas

Ekde 11 jan ĝis 12 feb 2012 en la sud-ĉina Esperanto-Insulo Hajnano (Hai Nan Dao) okazos kvarsemajna kursaro en la Hajnana Universitato. Al la kursaro jam aliĝis 124 personoj el 26 landoj.

Paralele funkcios BEK-kurso por komencantoj, seminario por instruistoj, kaj du universitataj kursoj: “Alfronti militon” de profesoro Ron Glossop kaj kurso pri historio kaj filozofio de la informadiko de profesoro Federico Gobbo. Fine de la sesio okazos ankaŭ KER-ekzamensesio je ĉiuj niveloj.

Laŭplane pri la laboro informos reta tagĵurnalo dum la tuta kursaro.

<http://www.esperanto-insulo.info/>

Drondo, por malkaŝe diskuti

Samtempe kun la porkomencanta semajnfina kurso Course-You-Can, pri kiu Ron Cufley artikolis en la decembra *Ondo*, en la Esperanto-Centro en Barlastono okazis la DiskutRondo “Drondo”.

En Drondoj diverstemaj diskutoj kernas, sed nur en Esperanto. Kutime la temoj gamas de modernaĵoj al leĝeraĵoj tra personaj vidpunktoj. Bonsorte, ke kutime ĉeestas homoj kun fortaj opinioj, ĉar tiel vagas la diskutado kaj drondanoj devas etendi sian lingvokapablon.

Drondo povus ŝajni granda paŝo por homoj, kiuj ĝis tiam ne multe engaĝis sin en parolado, sed ni celas esti bonvenigemaj kaj paciencemaj, donante la rimedojn por plibonigi parolkapablon. Michael Heary, kiu antaŭe nur unu Esperanto-eventon ĉeestis, raportis, ke “Kiel relativa novulo mi agnoskas, ke kelkajn temojn mi antaŭe taksis timigaj kaj alta estas la lingvonivelo. Sed ĝi

estis fortika ekzercado pri komprenado kaj multon mi lernis dum kaj la sesioj kaj la manĝo-paŭzoj”.

Je la ĵus okazinta Drondo ni provis novan sistemon pri “gastestroj”. Kiel kutime mi estris la plejmulton sed ĉi-foje mi sukcesis senlabore partopreni, ĉar la redaktoro de *Esperanto en Skotlando* Ed Robertson preparis notojn por sesio gvidata de li pri “Internaciismo aŭ Sennaciismo?”

Ed ankaŭ helpis min, ĉar ni dividis du sesiojn pri la grandega temo “La Tumulto en Anglio”, kiu permesis al ni ambaŭ pliprofundigi la diskutadon, ĉar ni tenas tute malajn opiniojn pri la afero, kaj do havis la okazon paroli libere.

La tria “peza” temo “La Ĝenerala Striko”, celas strikon proponitan de tri milionoj da laboristoj en Britio, ĉar la registaro anoncis sian deziron kontribui de publikaj laboristoj pli da mono en siajn eventualajn pensionkestojn. Ankaŭ en tiu temo aŭdiĝis fortaj voĉoj. Estus tede, ĉu ne, se ĉiuj interkonsentus?

La lasta peza temo (kaj ankaŭ la unua diskutita) temis pri “Mortigo”, kaj ĉu la ordo en la Biblio, ke oni ne mortigu, ĉiam validas. Kvankam kelkaj tute ne deziris diskuti la aferon, mi ĝojas, ke la plejparto konstatis, ke la temo etendiĝis al pluraj dimensioj, ekzemple malŝalto de spirmaŝino por amato, kiu neniam rekonsciiĝos, murdo de homoj, ekzemple Muamar Kadafi, kiu senriproĉe mortigas kaj torturas senkulpuojn, kaj ankaŭ kion fari en situacio, kiam onia agado savas kelkajn mortuntajn sed je kosto de iu alia.

Ni ankaŭ strebis malstreĉi nin, kaj do aldone al la bonega manĝaĵo kaj vizitoj al kampara drinkejo ni diskutis leĝerajn temojn. Ĉi-foje sole montriĝis sub tiu kategorio “Miskomprenoj”, kiu ebligis plenan partoprenon de ĉiuj pri ofendo senscie donita en aliaj landoj, amuzaj mispaŝoj per mangestoj en fremdaj landoj. Mi esperas iam starigi retpaĝaron por konservi kaj elŝutebligi la notojn, por ke aliuloj prunteprenu la ideon por doni al homoj en iliaj propraj landoj la okazon ekzerci sin en Esperanto kaj paŝi de malofta uzo al flua parolado.

Tim Owen

La suba foto montras la malnovan koleĝion en Barlastono, kie okazas Drondoj.



Urba semajfino

16 homoj el 3 landoj, inkluzive de la retfama muzikisto Manekeno, venis 19-20 dec al Harrisburg (Pensilvanio) por paroli Esperanton kune. Organizante ĉi tiun eventon, mi volis krei “modelan semajnfinojn”, kiun nordamerikaj esperanto-parolantoj povas uzi por organizi iliajn proprajn semajnfinajn renkontiĝojn tra la tuta kontinento.

Esence, mi pensas, ke amerikanoj havas malsimilajn bezonojn ol eŭropanoj. Amerikaj esperanto-parolantoj estas pli vastigitaj kaj havas malpli da feriaj tagoj ol tiuj en Eŭropo, do la mallongaj, lokaj renkontiĝoj pli taŭgas ol semajndaŭraj landaj aŭ internaciaj eventoj. Tiaj eventoj ankaŭ povus helpi partoprenantojn ne senti ke ili estas perditaj en homamaso, kaj ebligi al ili trovi aliajn esperanto-parolantojn loĝantajn apude, kiujn ili malofte povus renkonti ĉe landa kongreso.

Ni komencis nian renkontiĝon ĉe la bonega hinda restoracio *Pasejo al Barato*, kie mi surprizis ĉiujn per disdonado de hazardaj esperantaĵoj. Ĉiuj aplaŭdis kiam mi prezentis la dokumentan filmon *The Universal Language* (La Universala Lingvo). Poste, ni iris al Hershey's Chocolate World (Ĉokolada-mondo de Hershey).

Poste ni butikumis, foliumante librojn ĉe la librovendejo *Midtown Scholar* kaj reiris hotelen por manĝi germanan panon kaj malstreĉiĝi kune. Kelkaj iris por aĉeti lokan bieron kaj reiris al la hotelo, kie festo ekis, kaj malgraŭ la diversaj lingvoniveletoj, ĉiuj partoprenis kaj ĝuis. Ni spektis kelkajn amuzajn esperantlingvajn videojn, kiujn flujaj parolantoj interpretis por komencantoj. Tre amuza estis spekti la videojn de Manekeno dum ŝi estis kun ni! Ni ankaŭ amuziĝis per esperantlingva karaokeo.

La sekvan matenon ni komencis la vortdivenan ludon *Word Race* en Esperanto. Poste ni marŝis ĉirkaŭ Reservoir Park kaj iris al la Nacia Muzeo de Interna Milito. Mia celo estis ekvilibrigi lernigajn kaj amuzajn lokojn dum la evento. Poste mi diris ŝerco, ke mi provus plani viziton al pacmuzeo venontfoje!

Poste, ni manĝis tajajn mangiĵojn kaj transiris la riveron Susquehanna por sidi en kiosko sur City Island, ludante *Word Race*. Kelkaj eĉ diris ke, laŭ ili, ludi tiun ludon kune estis la plej bona parto de la semajnfino!

Chuck Smith

Sur la foto: La partoprenantoj en la hinda restoracio *Pasejo al Barato*.



Unuafoje en Ruslando

4 dec en la arta gastejo de la publika biblioteko Belinskij en Jekaterinburgo okazis la Ruslanda premiero de la dokumenta filmo *The Universal Language* (La universala lingvo) de la Novjorka reĝisoro Sam Green.

Post la spektado 21 spektantoj alte taksis la filmon kaj diskutis kelkajn problemojn, kiujn prezentis la reĝisoro. Li sobre traktas la nuntempan Esperantomovadon kaj la ideon de la internacia lingvo. La intervjuoj kun eminentaj esperantistoj interplektiĝis kun unikaj arĥivaj dokumentoj, kaj ili kreas absolute spektindan majstroverkon laŭ formo kaj enhavo.

La respondecoj de la arta gastejo entuziasmiĝis pri la ideo prezenti pliajn filmojn en kaj pri Esperanto probable kun subtekstoj en la rusa por konatigi neesperantistajn vizitantojn de la plej granda scienca biblioteko de la regiono kun la ideo de la internacia lingvo.

Aleksandr Osincev



Unufraze

★ Estrarano de UEA Stefano Keller ple-dis por respekto de lingvaj rajtoj k lingva diverseco en la kvara sesio de la UN-forumo pri Minoritatoj, okazinta 29-30 nov 2011 en Ĝenevo. (GK UEA)

★ Kvin membroj de la Asocio de Verdaj E-istoj partoprenis en la Eŭropa Kongreso de Verduloj (Parizo, 11-13 okt 2011) per intervenoj en diskutoj, E-presaĵoj k inform-kunveno. (Eŭropa Bulteno)

★ En la Vojvodina Kultur-Instituto en Novi Sad (Serbio) ĉi-novembre okazis solenaj aranĝoj okaze de la Internacia Tago de Toleremo k de la 80-jara datreveno de la konata e-isto Boriša Miliĉević. (Landa Agado)

★ 20 nov Hori Jasuo prelegis en la Patrino Kunveno en Ŝibukaŭa (Japanio) antaŭ 130 homoj pri la temo “Per Esperanto por Paco”. (Landa Agado)

★ En Malago (Andaluzio, Hispanio) estas elektita konstruaĵo, kiu post riparo ekfunkcios kiel E-Domo k sidejo de la E-Naturamikaro, okaze de kies asembleo en 2012 la E-domo estos inaŭgurita. (HeKo)

★ Kunlabore kun la Hainan-a Universitato, Hainan-a E-Asocio 20 nov 2011 komencis kurson, al kiu el pli ol 500 dezirantoj estis akceptitaj 108 studentoj, inter kiuj la plej sukcesaj estos volontuloj por prepari la projekton Esperanto-Insulo. (ĈIIC)

★ 16 nov komenciĝis la dua kurso de Eo en la Zaozhuang-a Profesia Instituto (Ĉinio), kie al 73 studentoj instruas tri instruistoj. (ĈIIC)

★ Ekde 26 sep ĝis 3 dec 2011 en la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (Meksiko) Sergio Romero k Carlos Hernández Loarca gvidis E-kurson por studentoj. (www.ameriko.org)

★ Tatjana Loskutova (Ruslando) en sia instruvojaĝo tra Indonezio instruis Eon en Bandung, Yogyakarta, Malang, Ĝakarta k Medan. (Esperanto en Azio)

★ En la suda Tajvana urbo Pingtung, Reza Kheirkhah k Ingrid Chuang gvidas E-kursojn por sume 55 kursanoj ĉe la Komunuma Universitato, ĉe la lernejo Pingrong, ĉe Fŭia elementa lernejo k private. (R.K.)

★ En la elementa lernejo Baotalu en la urbo Zhenjiang (ĉina provinco Jiangsu) 21 gelernantoj 6-7-jaraj eklernis Eon sub la gvido de Neĝeta k ŝia edzo Michel Fontaine el Francio; 21 pli aĝaj lernantoj jam la kvaran jaron lernas la lingvon sub la gvido de Fontaine. (ĈIIC)

★ La Konsulo de la E-ta Civito, Giorgio Silfer, nomumis tri novajn membrojn de la Lingva Komitato de la civito: Georgi Mihalkov, István Nemere, Tomasz Chmielik. (HeKo)

El unu venas kvar lingvoj

de Dafydd ab Iago

Eŭropa Unio foje ŝajnas miraklo. Eĉ en la mezo de la plej granda minaco al la unuiĝo de la plej diversaj Eŭropaj landoj, ĝi akceptas novan membron: Kroatio. La pligrandiĝo de EU per Kroatio signifas ankaŭ la daŭrigon de la promeso farita al sudorientaj Eŭropaj landoj — se ili akceptas demokration kaj daŭrigas siajn reformvojojn, ili povos aliĝi al EU.

La pligrandiĝo de EU per Kroatio sekvas la aliĝon de Rumanio kaj Bulgario en 2007 kaj de la dek centreŭropaj landoj en 2004. Ĝi ankaŭ estas klara signalo al tiuj, kiuj pro diversaj kialoj kritikis la koncepton de la unuiĝinta Eŭropo, ĉu dekstre, ĉu maldekstre: Eŭropo daŭrigos sian vojon al unuiĝo.

Tamen daŭre mankas komuna lingvo. Akceptante Kroation, EU aplikas la unuan decidon (1958/1), laŭ kiu rajtas esti lingvoj de EU nur tiuj, kiuj estas oficialaj sur la teritorio de membro-ŝtato. Kompreneble, en Kroatio oficiala estas la

Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio (Foto EK)



La Esperanta Civito kreskis je 46%

La 30an de novembro 2011 kompletigis la dua oficiala censado de la Esperanta Civito. Kompare kun la unua censado, je 30 novembro 2006, la Civitanaro kreskis je 45,8%, de 275 al 401, el kiuj 366 estas voĉrajtaj okaze de la elektoj por la Senato, la 15an de decembro 2011.

Laŭ la balotejoj, la distribuo de la elektantoj estas la sekva:

Atekvatora (en Lomeo, por ĉiuj rezidantoj en afrikaj landoj norde de la ekvatoro, escepte de Kongolandoj): 33.

Subekvatora (en Buĵumburo, por ĉiuj rezidantoj en afrikaj landoj sude de la ekvatoro, escepte de Kongolando kaj Ruando): 63.

Konga (en Gomo, por ĉiuj rezidantoj en la tri Kongolandoj kaj Ruando): 20.

Balkana (en Razgrado, por ĉiuj rezidantoj en Albanio, Bosnio, Bulgario, Kosovo, Makedonio, Montenegro, Rumanio, Serbio kaj Turkio): 34.

Balta (apud Stokholmo, por ĉiuj rezidantoj en Danlando, Finnlando, Germanio, Norvegio, Pollando, Svedio, iama Sovetunio kaj kaŭkazaj teritorioj): 28.

Iberia (en Malago, por ĉiuj rezidantoj en Andoro, Hispanio, Katalunio, Portugalio): 19.

kroata, same kiel la serba en Serbio. Kaj nun oficialas la bosna en Bosnio, kaj la montenegra en Montenegro.

Ni ĉiuj konscias, ke lingvoj ja ŝanĝiĝas, sed ĉu en periodo de malpli ol 20 jaroj eblas, ke el unu serba-kroata lingvo aperu kvar apartaj lingvoj? Pere de unuiĝo en EU, la popoloj de la sud-orienta Eŭropo retrovos iom de sia antaŭa komuneco. Tamen lingve EU disigas ilin kaj kreas diferencojn, kiuj antaŭe ne estis.

Bedaŭrinde, funkciuloj de la Eŭropa Komisiono daŭre insistas, ke la diferenco inter la serba, montenegra, bosna kaj kroata estas esence samaj, kiel inter la ĉeĥa kaj slovaka, aŭ, por uzi nordeŭropan ekzemplon, inter la dana, norvega kaj sveda. Pro tio oni bezonos iom post iom apartajn tradukskipojn por la sudslavaj lingvoj. Ĉu EU devas akcepti la belgan aŭ luksemburgan version de la franca kiel apartajn lingvojn? Ĉu la irlanda versio de la angla meritas apartan tradukservon?

Ne tiom ĝenas la malŝparo de Eŭropunia mono por tradukoj al la sudslavaj lingvoj. Tamen tii estas oficialigita, je tempo kiam milionoj da eŭropanoj estas senlaboraj kaj kiam membro-ŝtatoj bezonas monon por pagi bazajn sociajn servojn. Aliflanke, la samaj funkciuloj daŭre neas la eblecon uzi la gepatran lingvon por milionoj da eŭropanoj kiuj parolas katalune, kimre, galege, baske, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj parolas ruse, turke kaj arabe en EU.

Multlingvismo ŝajnas esti nura slogano en EU. Pro la ĉiam kreskanta graveco de la angla, en 2005 ĉirkaŭ 70% de ĉiuj Komisionaj dokumentoj estas unue skribitaj angle. Nun ni alproksimiĝas al la magia nombro 90%.

Ĝus antaŭ la pli frua pligrandiĝo de la EU, *La Ondo de Esperanto* enketis pri la lingvaj efikoj. Ĉu la Komisiono antaŭvidas ankaŭ apartajn servojn por la kroata, bosnia kaj serba lingvoj, ni tiam demandis? “Estas tro frue por komenti tion”, — agnoskis en 2005 Frédéric Vincent, priparolanto de la Komisiono. (*La Ondo de Esperanto*, 2005, №8-9). Ses jarojn poste, EU ankoraŭ ne scias, kion fari.

Mediterranea (en Milano, por ĉiuj rezidantoj en Grekio, Israelo, Italio, Malto, San-Marino): 38.

Mezeŭropa (en Ĉaŭdefono, por ĉiuj rezidantoj en Aŭstrio, Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Lihtenŝtejno, Slovakio, Slovenio, Svislando): 62.

Okcidenteŭropa (en Angulemo, por ĉiuj rezidantoj en Belgio, Britio, Francio, Irlando, Islando, Luksemburgio, Monako, Nederlando): 36.

Latinamerika (en Karakaso, por ĉiuj rezidantoj en latinamerikaj landoj, escepte de Meksiko): 11.

Pacifika (apud Meksikurbo, kun subbalotejo en Katmanduo, por ĉiuj rezidantoj en Kanado, Meksiko, Usono, Oceanio kaj Azio, sed ne Israelo, Turkio, iama Sovetunio kaj kaŭkazaj teritorioj): 22.

HeKo

RADIO		Radio Esperanto
ESPERANTO		<i>Halina kaj Aleksander parolas el Kaliningrado</i> Podkasta servo de <i>La Ondo</i> Aŭskultu: http://la-ondo.rpod.ru



Eltriraĵo el la titol-folio de la revuo “Cogabled volapükelas”, ŝerc-revuo de la Munkena Volapuka Klubo, 1886, №1.

Dat-revene kaj rememore

Feliĉa estas, kiu kun plezuro
Parolas pri la patroj, kiu ĝoje
Rakontas pri iliaj grandaj agoj
kaj en la fino de la bela vico
Sin mem fiere vidas.
(Goethe, *Ifigenio* 5, 3)

2012 portos du gravajn dat-revenojn: pasos **100 jaroj de la morto de Johann Martin Schleyer**, la aŭtoro de Volapük, kaj **125 jaroj de la publikigo de la unua lerno-libro de Esperanto**. Ambaŭ dat-revenoj estas kaŭzo por Bavara Ŝtata Biblioteko en Munkeno aranĝi tri-monatan ekspozicion pri planlingvoj kaj fakan simpozion.

Ĉi-foje ni retrovagigas la rigardon al la jaroj 1837 (175 jaroj), 1862 (150 jaroj), 1887 (125 jaroj), 1912 (100 jaroj), 1937 (75 jaroj) kaj 1962 (50 jaroj).

1837

Naskiĝis Mark Fabianoviĉ Zamenhof (01-27, Gregorie 02-8, Suvaŭki), la patro de Lazarj Markoviĉ Zamenhof.

1862

En tiu jaro naskiĝis la poste konataj esperantistoj Alfred Edward Wackrill (02-11, London), Mavro Ŝpicer (04-01, Naŝice), Albert Steche (09-09, Leipzig), Vasilij Devjatnin (?, Lisovo, Orjola gub.) kaj la idisto kaj posta deputito Wilhelm Heinrich Peus (07-24, Elberfeld).

1887

Naskiĝis Hector Hodler (1-10, Genève), kunfondinto de UEA.

1912

La 8a UK okazis en Krakovo kaj Zamenhof retiriĝis en privatecon. V. N. Devjatnin pied-iris de Parizo al Krakovo kaj ludis gravan rolon en la propagando de la (fiaskinta) projekto “Parkurbo Esperanto” ĉe Munkeno.

Laŭlonge de la jaro 1912 naskiĝis: Tibor Sekelj (02-14, Spiška Sobota), Pol Denoel (02-22, Liège), Hasegawa Teru (03-07, Sarukaŝi), Jean-Jacques Mahé (pseŭd. Lorjak, 04-12, ?), Tadros Megalli (04-28, Fajun), Albert Goodheir (06-12, Utrecht), Bojidar Popović; (10-26, Klivovac).

Mortis: Amatus van der Biest (01-22, Antwerpen), William Thomas Stead (04-15, dronis kun la ŝipo *Titanic*) kaj

Henri Dor (10-20, Lyon). En Innsbruck forpasis 03-04 la aŭtoro de la cifere-lingvo, Ferdinand Hilbe.

Sur la libro-merkato aperis: originalaĵoj de H. A. Luyken (*Paŭlo Debenham*), John Merchant (*Tri angloj alilande*), G. Deŝkin (*Versaĵoj*) kaj du tradukoj de Grabowski (*Halka* de Wolski kaj *Mazepa* de Słowacki). Same eliris la unuaj historiografiaj verketoj de Fiŝer kaj Privat.

1937

En la 50-jara jubileo de Esperanto la UK okazis en Varsovio. Tiu-jare forpasis:

Alfred Michaux (?, Boulogne-sur-Mer), Ernest Drezen (10-17, ekzekutita), la idisto Jules Gross (06-24, Martigny), Juliette Vatré-Baudin (01-11, Genève), Albert Schramm (10-25, Tübingen), Vovevolad Pavloviĉ Ivanov (11-24, Bulgario), Vladimir Sutkovoĵ (sam-tage).

Naskiĝis Roman Dobrzyński (11-04).

Inter la originalaĵoj de nia literaturo menciindas la furorlibro *La verda koro* de Baghy, *Juneca ardo* de Barthelmeŝ kaj *Forgesitaj homoj* de Cicio Mar. Du memor-libroj gardis trans-tagan valoron: *Arĝenta duopo* (por Baghy kaj Kalocsay) kaj *Ora libro de la Esperanto-movado*. Eliris la serio “Muusses Esperanto-Biblioteko” en Nederlando.

1962

Pasos duona jar-cento post la morto de Jean Ribillard (02-16, Papeete, Tahitio) kaj de Edmond Privat (08-28). Fariĝos 50-jara la fama aŭtoro helveta Andreas Erwin Künzli.

La eldonejo *Stafeto* publikigis la Zamenhof-biografion de Boulton, la poemaron *Ekzilo kaj azilo* de Baranyai kaj la pastičojn *Specimene* de H. Vatré.

La UK okazis en Kopenhago.

Reinhard Haupenthal

Savi la vivon! (5)

Klaus Perko (Aŭstrio)	100,00
Jean Amouroux (Francio)	100,00
Anonima (Francio)	300,00
Madette Ast (Francio)	20,00
Anne Jausions (Francio)	60,00
Geneviève Martin (Francio)	21,00
Mougin-Robillard (Francio)	30,00
Rosa Raspall (Francio)	25,00
Pierre Royer (Francio)	50,00
Jacques Roux (Francio)	200,00
Jacques Roux (Francio)	150,00
E-rondo Neŭbrandenburgio (Germanio)	300,00
Anonima (Nederlando)	25,00
Entute ekde 16 okt ĝis 10 dec 2011	1381,00
Je la 15a de oktobro 2011	26.638,45
Je la 10a de decembro 2011	28.019,45

La monoklekta kampanjo brile sukcesis kaj repruis la solidaremon kaj helpemon de la esperantistaro. Koran dankon pro la malavaraj donacoj, grandaj kaj etaj, kiuj helpis al Halina elteni la problemplenan restadon en Moskvo!

La resto, kiu estas nun en nia dispono, estas kaj estos uzata por la postoperacia flegado kaj kuracado, por medikamentoj, por la necesaj ĉiumonataj vojaĝoj inter Kaliningrado kaj Moskvo. La donacojn, kiujn ni ricevas post nia reveno al Kaliningrado, ni plu publikigos en *La Ondo de Esperanto*.

Aleksander Korĵenkov



Zamenhof ploras pro manko de gazetanoncoj

La alvoko de Etsuo Miyoshi aperis en la rubriko *Leterkesto* de la novembra numero de la revuo *Esperanto*, sub la titolo *Ĉu ni mortu aŭ prosperu?* Li skribas interalie:

Se ni klare konigos la avantaĝojn de Esperanto, EU-anoj certe repensos pri lingva malegaleco <...> Feliĉe UEA havas kelkajn milionojn da eŭroj. Tio sufiĉas por samtage reklami en 27 landoj ĉiumonate dum unu jaro. Jen investo por la estonto! Granda kampanjo certe vekos EU-anojn.

Etsuo Miyoshi



Etsuo Miyoshi estas konata mecenato, kiu pli frue mem financis kelkajn anonckampanjojn pri Esperanto en diversaj eŭropaj gazetoj. Oni tamen ne konstatis grandan efikon de la kostaj tutpaĝaj anoncoj, kaj la alvoko de Etsuo Miyoshi ne vekis apartan entuziasmon inter la legantoj de la revuo.

En unu el malmultaj komentoj en la reta diskutejo de UEA-membroj, Peter Weide el Danlando esprimis fortajn dubojn:

En la antaŭa numero de la revuo aperis propono, en kiu mi legis la aserton, ke UEA disponas je amaso da mono kaj ke UEA uzu tiun monon por anoncoj en la grandaj ĵurnaloj. Mi memoras, ke antaŭ kelkaj jaroj aperis tia anonco en granda dana gazeto. La efiko estis, kiel antaŭvideblis, absolute nula. Tiun monon, kiun oni tiam elspezis, oni facile povus esti uzinta pli efike.

Male opiniis reprezentantoj de la pola sekcio de la partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto, kiuj dissendis al multaj adresoj — tamen ne tiuj de UEA — leteron direktitan al la estraro de UEA. La letero, subskribita de Franciszek Witucki, la prezidanto de la pola societo EDE, enhavas interalie la jenajn vortojn:

Pola Societo EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) plene apogas la tekston de la letero de Etsuo Miyoshi, kiu aperis en la lasta numero de *Esperanto* Revuo (n-ro 1252/11/ — Novembro 2011 235). Ni samopinias, ke Ludoviko Zamenhof el ĉielo observante agojn de la nuna UEA certe ploras. Ĉar tia agado pli apogas la firmigon de dominado de la angla en Eŭropo kaj en la tuta mondo ol disvastigadon de Esperanto kaj enkondukon de ĝia ideo. Fakte la nunaj estraranoj de UEA perdis rajton uzi la vorton *Esperanto*...

Libera Folio turnis sin al la estraro kaj Centra Oficejo de UEA por ekscii, kiel la asocio sintenas al la afero. Post interkonsiliĝo kun la estraro, respondis la ĝenerala direktoro de la asocio, Osmo Buller.

Libera Folio: Ĉu vi konsentas kun la proponintoj, ke UEA elspezu monon el sia kapitalo por fari komercan reklamon por Esperanto?

Osmo Buller: Oni bezonas nek konsenti nek malkonsenti. La supozo, ke UEA posedas milionojn da eŭroj, estas erara kaj eble bazita sur la bilanco, kies sumo pasintjare estis 5,5 milionoj. Preskaŭ duono de tio ne apartenas al UEA sed konsistas el UEA-kontoj kaj ŝpardeponoj de membroj. La cetero estas ĉefe specialaj kapitaloj kaj fondaĵoj por fiksitaj celoj. La propra kapitalo de UEA, iom pli ol unu miliono, estas netuŝebla laŭ la Statuto.

Libera Folio: Ĉu laŭ via pritakso la grandaj monsumoj, elspezitaj de Etsuo Miyoshi por reklamo por Esperanto en eŭropaj gazetoj, alportis utilon proporcian al la kvanto de la elspezita mono?

Osmo Buller: Tiun demandon povas respondi nur la landaj asocioj de la koncernaj landoj.

Libera Folio: Ĉu vi vidas ian bazon por la kritiko de la pola EDE, laŭ kiu UEA ne sufiĉe laboras por diskonigi Esperanton? Kion plian laŭ via opinio povus kaj devus fari UEA, aliaj movadaj instancoj, kaj unuopaj esperantistoj kun financaj rimedoj, por diskonigi Esperanton?

Osmo Buller: UEA kaj multaj aliaj faras sian plejebilon, sed la tasko estas tiel superforta, ke neniu povas fari sufiĉe. Mi ne scias, kiom da novaj esperantistoj kreis EDE, sed ekzemple la kreigo kaj pluekzisto de Esperanto-movado en tuta kontinento, Afriko, kaj en diversaj triamondaj landoj, rezultis el projektoj de UEA aŭ eblis per subteno de UEA. Oni ne povas simple kalkuli, ke A faras 10-oble pli ol B por disvastigi Esperanton, se A elspezas 10-oble pli da mono, eĉ se la rezultoj estus efemeraj aŭ tute neniam. En tia konkurso UEA ne partoprenas, sed ĝi klopodas atingi rezultojn, kiuj daŭros. Por tio pli gravas prudento ol mono.

Reprezentantoj de la pola EDE ne respondis al demandoj de *Libera Folio*.

Laŭ Libera Folio

KAEST: Modernaj edukaj metodoj

KAEST estas mallongigo de “Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko”. Temas pri specifa konferenco, unu el unikaj ebloj ene de nia komunumo prelegi (aŭ spekti prelegojn) pri diversaj fakoj, rilataj al scienco kaj tekniko en Esperanto. La sekvan konferencon 15–18 nov 2012 gastigos la Slovacia urbeto Modra-Harmónia, nur 30 km de la ĉefurbo Bratislava kaj 90 km de Vieno.

La ĉeftemo de KAEST 2012 estas “Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj”.

La programo de KAEST konsistas el kelkaj partoj:

- prelegoj (du paralelaj blokoj: ĉeftemaj kaj alitemaj);
- trejnado (Vikipedio, komputila laboro, metiejoj);
- fakaj diskutoj (pri certa temo);
- vespera neformala programo;
- ekskursoj.

La 323-paĝa prelegkolekto de KAEST 2010, kun 33 prelegoj el 27 aŭtoroj estas mendebla kontraŭ 9 eŭroj ĉe petro@ikso.net.

La retejo de KAEST: <http://kaest.ikso.net/>

Peter Baláž

Respektemo estu respektata

Dankon al José Antonio Vergara, kiu per sia artikolo (LOdE, 2011, №12) kaj postaj komentoj en la reto formulas ion, kion multaj el ni jam spertas kaj vivas (“vivi” povas esti transitiva, ĉu ne?). Tamen kelkfoje necesas, ke iu vestu tiujn travivaĵojn kaj sentojn per vortoj, por ke oni vidu klare. La homa menso emas al polusoj, en Esperantujo ofte oni nomas tiujn malojn “finvenkismo” kaj “raŭmismo”, sed memklare ekzistas alternativaj sintenoj kaj aplikoj. “Plivastismo” laŭ mia sento estas ĝuste praktika kaj pragmata, multflanka. Ĝia kerno estas respektemo. Ĝi do ankaŭ estu respektata.

Maria Sandelin

Al ĉiu duan lingvon

Nu, mi ja estas tia strangulo kiu opinias ke la lingvo estas ne socia, sed individua afero. Mi do iel malsamopinias al ĉi tiu cetere tre simpatia artikolo de José Vergara en la decembra *Ondo*.

“Esperanto ja estas ilo por ŝanĝ(et)i la mondon”, — li skribis.

Fakte, la lingvoscio pli ĝuste estas ilo por *vidi* la mondon. Lernante lingvojn kaj tenante tiujn aŭ aliajn vidpunktojn pri iliaj interrilatoj, oni do ŝanĝas nur sin mem. Komprenible, ja, la individua memŝanĝado estas la fonto de ĉiuj sociaj ŝanĝoj. Sed ni daŭre traktas la lingvon kvazaŭ ĝi *per si mem* estus fenomeno socia, ne psika, kaj ni konstante perdegas ŝancojn pro tio.

Tial mi ankaŭ ne volas tute rezigni pri la devizo “ĉies dua lingvo”, sed nur modifi ĝin iomete: “al ĉiu duan lingvon”. Ni laboras por mondo en kiu estos tute normale ke ĉiu ajn kreskas kun almenaŭ du lingvoj kaj (almenaŭ principe) egale estimas ĉiujn ekde la plej ekzota ĝangala dialekto ĝis la lingvo plej vaste parolata denaske de sciencistoj — kiu apenaŭ estos Esperanto, eĉ se la homoj de tia mondo vaste uzos ĝin, konstatante ke sen ĝi ne eblas vidi sin mem kiel egalan kaj liberan anon de la homaro.

Iuj vivas en pli-malpli liberaj landoj, sed ni ĉiuj vivas en nelibera mondo. Ni vivas en mondo kie la regantoj rajtas kredi ke ili ne bezonas pli ol unu lingvon, ĉar ilia patrio kun sia lingvo estas supera al ĉiuj aliaj. Nia tasko estas kompreni, ke eĉ se *objektive* montriĝus ke la plej forta lando de la mondo ankaŭ estas la plej modela... tio ne signifos ke ĝia lingvo estas modela (nek, cetere, malmodela). Kial ne? Ĉar la lingvo-diverseco estas *subjektiva* afero, kaj protektinda kiel tia. Objektive ekzistas nur unu lingvo, la homa.

Jens Stengard Larsen

Alloga idea platformo de plivastismo

Mi konsentas kun José Antonio Vergara (LOdE, 2011, №12) pri preskaŭ ĉio (krom pri la valoro de la Manifesto de Prago, sed tio estas relative malĉefa afero). Granda parto de tio, kio konsistigas la valoron de Esperanto por ĝiaj uzantoj, estas la “alternativa kunkrea praktiko kolektiva”, pri kiu José parolas. Ĝi estas ankaŭ priskribebla per la nocio “partoprena kulturo”. Jen io, kion Esperanto-parolantoj de generacioj efektivigas — multe pli longe ol ekzistas la elektronikaj komunikrimedoj kaj interrete bazitaj sociaj medioj, kiujn oni kutime temigas en rilato kun “partoprena kulturo”. Eble tiu ĉi nocio helpus al ni komuniki al la ekstera publiko la specifon de la komunumo, kiu uzas Esperanton.


Dua nocio, laŭ mi ankaŭ komunike utila, estas “praktika kosmopolitismo”. Esperanto-parolantoj de la komenco ne nur teoriomas tutmondecon, homaranecon k.s., sed vere faras ion praktikan por ebligi al homoj, ofte la malpli privilegiitaj, havi pli kosmopolitan vivstilon ol ili povus havi sen ĝi. Jen afero tute ne sen politikaj implicaĵoj, kiel la sennaciistoj jam en frua tempo komprenis.

Idea platformo de plivastismo allogas, dum la finvenkismo dekadencas kaj iom post iom ĉesas entuziasmigi, kaj la raŭmismo, kvankam en la komenco valora pensosprono, nun verŝajne ne plu saveblas el la ungegoj de la Civito, kiu neinvertigeble amalgamis ĝin kun mikronaciismo.

Gary Mickle

Kultura vojaĝo al Vjetnamio

E-duKati lanĉas retan kurson pri Vjetnamio. La kurso konsistas el 20 partoj kaj traktos inter aliaj la historion, kulturon, geografion, politikon, turismajn vidindaĵojn, religion kaj artojn de Vjetnamio. La unuopajn lecionojn sekvas testo, kio helpas en la alproprigo de la konoj.



La kursmaterialo celas pretigon pri la kongreslando al tiuj, kiuj partoprenos UK-on en somero 2012 kaj rekompensas tiujn, kiuj ne povos fari tiun vojaĝon. Dumkongrese estos ankaŭ ĉeesta programo por la kursanoj.

La reta kultura vojaĝo komenciĝos en decembro. Antaŭaliĝintoj havos rabaton.

La temoj de la kurso

1. Superrigardo kaj historio
2. Demografio
3. Religioj
4. Kutimoj
5. Skribo kaj literaturo
6. Edukado kaj scienco
7. Festivaloj kaj ludoj
8. Artaj spektakloj
9. Muziko
10. Tradiciaj kostumoj
11. Arkitekturo kaj belartoj
12. Gastronomio
13. Ekonomio, komerco, merkatoj
14. Flaŭro kaj faŭno
15. Medicino kaj kuracaj plantoj
16. Turismo en nordo 1
17. Turismo en nordo 2
18. Turismo en centro
19. Turismo en sudo
20. Esperanta kulturo.

La kurskotizoj varias laŭlande. Por kvin membroj de lernejoj klasoj aŭ por maksimume 3 samfamilianoj, sed tamen kun apartaj kontoj ĉe edukado.net, ni proponas rabaton. Vidu la sekcion kunstudantoj en la tabelo.

Pri la pagmanieroj vidu la informojn ĉe

<http://edukado.net/klerigejo/pagoj>

Petu pliajn informojn rete:

klerigejo@edukado.net

Nguyen Xuan Thu, ĉiĉerono
Katalin Kováts, kursgvadanto

23 nov 2011 en Bergen forpasis

Elna Matland (1921-2011)

Lerninte Esperanton en 1939, ŝi baldaŭ ekaktivis movade, estis prezidanto aŭ sekretario de la Esperanto-klubo en Bergeno kaj Sauda, delegito de UEA, estrarano de la Norvega Esperantista Ligo kaj ĝia prezidanto (1985-1991), komitatano de UEA (1983-1995), prezidanto de LKK de la 76a UK en Bergeno (1991), Honora Membro de UEA (1992), ricevinto de la Reĝa Arĝenta Medalo pro Merito (2009).

Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (17)

de Halina Gorecka

Teritoriaj dividoj

Pro la eventoj de la *Novembra revolucio* la 9an de novembro 1918 Imperiestro Vilhelmo II abdikis, kaj 19 jan 1919 okazis elektoj por la Nacia Asembleo. La elektitaj deputitoj kunvenis ne en Berlino, kaptita de tumultoj, sed en Weimar. La Asembleo elektis la prezidenton kaj kancelieron de Deutsches Reich (Germana Regno).

Laŭ la Versajla packontrakto Germanio devis cedi parton de sia teritorio kaj siajn koloniojn. Kadre de nia rakonto nin interesas nur la orientaj teroj. Pollando ricevis kelkajn distriktojn en la malsupra fluo de Vistulo, kaj la 71-kilometran strion ĉe la Balta Maro, pro kio la Orienta Prusio estis fortranĉita de la ĉefa Germanio per la Pola Koridoro, nur 30-kilometra en la plej mallarĝa loko.

El la Orienta Prusio estis eligita nova administra unuo, la Libera Urbo Dancigo (nun Gdańsk), kun 95-procente germanlingva loĝantaro — sub la kontrolo de la Ligo de Nacioj, sed en la Pollanda dogana regiono.

Pri tiutempaj cirkonstancoj diras, ekzemple, informilo pri la 2a Danciga Esperanto Kongreso (10–14 aŭg 1923): “Por la trajnveturo al Dancigo necesas vizoj en la pasporto: por regnaj germanoj — germana deklaro pri nedanĝereco kaj *pola* vizo, por ceteraj eksterlandanoj — pola vizo kaj por vojaĝoj tra germanaj regionoj — germana vizo...” (*Germana Esperantisto*, 1923, №5, p. 78).

La estontecon de la sudaj distriktoj de la Orienta Prusio (Marienwerder kaj Allenstein) devis solvi plebiscito.

Varmia-Mazuria plebiscito

Aligo de Varmio, Mazurio kaj Ĉevistula regiono al Pollando estis argumentata per multnombra pola loĝantaro tiea. Ĉiuj loĝantoj de ĉi tiu parto de la Orienta Prusio devis voĉdoni, ĉu aliĝi al la refondita Pollando, ĉu resti en Germanio. La plebiscito estis efektivigata sub kontrolo de la Ligo de Nacioj.

La plebiscito, okazinta la 11an de julio 1920, montris, ke la pola loĝantaro ne rapidis unuiĝi kun Pollando. En la distrikto Allenstein (Olsztyn) por Germanio voĉdonis 363.209 homoj, por Pollando 7.980. En la distrikto Marienwerder (Kwidzyn) 96.894 homoj favoris Germanion, kaj 7.947 Pollandon.



La Danciga Koridoro disigis la Orientan Prusion dis de la cetera Germanio. La cifero 1 signas la Liberan Urbon Dancigo.

84,3% de la loĝantaro voĉdonis por Germanio. Rezulte de la plebiscito al Pollando transiris nur ok subdistriktoj (kvin en la Ĉevistula regiono kaj tri en Mazuroj), la riverhaveno en Korzeniewo kaj la fervojponto en Opalenie.

Ribelo en Memellando

Norde de Nemano la Orienta Prusio perdis la urbon Memel (nun Klaipėda) kun la plejparte germanlingva distrikto Memellando, kiu estis transdonita sub la protekton de la Ligo de Nacioj, lokinta tie francan garnizonon. En januaro 1923 en Memel ekflamis ribelo kun la postulo de aliĝo al Litovio. La Litovia registaro subtenis la ribelintojn. Fine, post unujara traktado en 1924 Memellando iĝis aŭtonomia regiono de Litovio.

La nova “insula” situo de la Orienta Prusio izolis ĝin de la teritorioj, kun kiuj ĝi havis intencajn ekonomiajn, historiajn kaj kulturajn ligojn. Estis interrompita, interalie, la transita Ruslanda transporta kaj vara trafiko — gravega enspezfonto de la provinco.

Streĉiteco politika

En kaj ĉirkaŭ la fortranĉitaj teritorioj ekestis streĉa politika situacio, pro la teritoriaj pretendoj de Pollando. En la dua duono de 1919 la politika kaj armea elito de la Orienta kaj Okcidenta Prusio starigis projekton de memstara orienta ŝtato por respondi la ambiciojn de la najbara lando per armeaj rimedoj.

Realigo de tiu plano renkontis kontraŭstaron de la armea gvidantaro de Germanio, ĉar ĝi ne konformis al la ekstera politiko de la Regno, laŭ kiu la Orienta Prusio devis nepre resti en Germanio. Sed solvi la disputon kun Pollando (kaj Litovio) per armea forto en la kondiĉoj de la respubliko de Weimar ne

eblis pro la senarmiĝo de Germanio antaŭvidita de la Versajla packontrakto. La malkonkordo estis reguligita per diplomaciaj rimedoj.

La situacio reboniĝas

En 1922 en la itala Rapallo Germanio kaj Soveta Ruslando starigis diplomaciajn rilatojn, kaj Orienta Prusio ekhavis en la oriento gravan komercan partneron. Samjare estis lanĉita avia linio Moskvo-Kenigsbergo. Inter la pasaĝeroj de la unua aviadilo, alteriĝinta la 10an de majo 1922 en la Kenigsberga flughaveno Dewau, estis la rusa poeto Sergej Jesenin kaj lia usona edzino Isadora Duncan. Ruslando ekpartoprenis per ekspozicio de eksportaj varoj en la Germana orienta foiro, kiu ekde 1920 disvolviĝis en Kenigsbergo. En aprilo 1923 en Kenigsbergo ekfunkciis konsulejo de Soveta Ruslando.

La 1an de aprilo 1924 en Kenigsbergo estis fondita akcia societo “Orient-prusia radio”. La radiostacio estis konstruita dum unu monato apud la pordego Sackheimer. La provelsendoj estis faritaj la 1an de majo, kaj ili estis ricevataj en la urba teatro. Ekde la 14a de junio komenciĝis regulaj elsendoj, komence nur du fojojn tage en la formo de klasikmuzikaj koncertoj, fine de la jaro la programoj plilongiĝis kaj alternis ilin informaj sciigoj.

Baldaŭ la programoj intensiĝis, inter ili estis ankaŭ “Kurso de Esperanto” — instruprograme, kiun gvidis la loka esperantisto Gustav Schattat. La Esperanto-programoj okazis dufoje en semajno, krom la lecionoj estis ankaŭ paroladoj kun kontribuoj de Konrad Nitz. Radia Esperanto-parolistino estis ankaŭ Agnes Wermke. Dum la UK en Dancigo (1927) la radio-stacioj de Dancigo kaj Kenigsbergo aŭdigis salutparoladojn de diversnaciaj kongresanoj nacilingve kaj en Esperanto.

En januaro 1927 la Regna registaro akceptis specialan programon de helpo al malgrandaj kaj mezaj entreprenoj de la Orienta Prusio. Al ili estis disponigitaj kreditoj, ankaŭ al forstprilabora kaj farunprodukta industrioj.

Pro la perdo de Dancigo kaj Memel reaktivigis la Kenigsberga haveno. La ŝtato surpris zorgojn pri ĝia vastigo kaj modernigo. Estis konstruitaj grendeponejoj — la plej grandaj en Eŭropo, aperis novaj gruoj, fridujoj. Pligrandiĝis la havena ŝiparo. Al la havena sistemo aldoniĝis novaj fervojaj linioj.

Sed proksimiĝis la monda krizo...

(*Daŭrigota*)

El “Mia Jarcento”

de Günter Grass

En 1999 aperis *Mia jarcento* de Günter Grass — cent mallongaj rakontoj, mozaikeroj de la dudeka jarcento. El malsamaj perspektivoj aperas malsamaj personoj: simpatiaj kaj malsimpatiaj, krimuloj kaj viktimoj, viroj kaj virinoj. Tiuj rakontetoj ligiĝas intime kun la germana historio, kaj finfine el la bunta ĥaoso aperas plena bildo de nia dudeka jarcento. Jam dek ĉapitroj el *Mia jarcento* de la nobel-premiito Grass aperis en *La Ondo de Esperanto*, elektite kaj tradukite de Wolfgang Kirschstein. Nun ni proponas la dek-unuan eron, pri Georg Heym.

1912

Kvankam mi gajnis mian vivpanon kiel bordogardisto ĉe la akvoadministracio en Potsdamo, mi tamen verkis poemojn, en kiuj krepuskis la fino de la mondo, kaj la morto plenumis sian oficon, do mi estis preta al ajna hororo. Tio okazis meze de januaro. Du jarojn antaŭe mi unuafoje spertis lian prezenton en la kazino *Nollendorf*, kie renkontiĝis la Nova Klubo¹ en Kleist-strato. Poste pli ofte, ĉiam kiam eblis la longa vojaĝo. Miaj sonetoj apenaŭ kaptis atenton, sed li ne estis preteraŭskultebla. Poste mi spertis lian vortpovon en la *Novpatosa Kabaredo* — ankaŭ Blass kaj Wolfenstein ĉeestis. En bruantaj kolonoj la versoj preterpasis. Marŝo de monotonaj monologoj, kondukanta rekte al la buĉejo. Sed poste la infaneca giganto eksplodis. Estis kiel la erupcio de Krakatoa en la antaŭa jaro. Tiam li jam verkis por *L'Ago*² de Pfemfert, ekzemple tuj post la plej aktuala Maroka krizo³, kiam la tuta situacio estis malcerta kaj ni jam aŭdacis esperi, ke ni baldaŭ ekbatalos, li verkis la poemon *La milito*. Mi ankoraŭ aŭdas: “Sennombre la kadavroj en la fragmito etenditaj / de l' birdoj de la morto blanke kovritaj”. Entute blanka kaj nigra estis liaj favoratoj, speciale blanka. Ne estis miraklo, ke sur la rivero Havel, jam de monatoj frostiĝinta, sur la senlime irebla blanka surfaco, troviĝis tiu nigra truo, kvazaŭ atendante lin.

Kia perdo! Sed kial, ni demandis nin, la *Vossa Ĵurnalo* ne aperigis nekrologon pri li? Nur mallonga notico: “Marde posttagmeze referendumo d-ro Georg Heym kaj kandidato de la jurista fakultato Ernst Balcke dum glacikurado vidal-vidal al Kladow falis en truon, kiu estis hakita por akvobirdoj”.

Nenio plu. Sed tio pravas. Ni rimarkis la akcidenton de la insulo Schwanenwerder. Mi de la akvoadministracio kaj mia asistanto kune kun kelkaj glaci-kurantoj atingis la danĝeran lokon, sed

ni trovis nur, kiel evidentiĝis poste, la bastonon de Heym kun la elegante ornamita kapeto kaj liajn gantojn. Eble li volis helpi la falintan amikon kaj same falis kun si. Aŭ ili ambaŭ volis morti kune.

Krome la *Vossa* menciis, kvazaŭ tio estus grava, ke li estis filo de eksa armea advokato Heym, loĝanta en Reĝovojo 31 en la kvartalo Charlottenburg. La patro de la mortinta kandidato Balcke estis bankisto. Sed nenio, neniu vorto pri la motivoj, kiuj logis la du junulojn intence forlasi la sekuran glacivojon, markitan per pajlofaskoj kaj bastonoj. Nenio pri la interna mizero de nia, jam tiam, perdita generacio. Nenio pri la poemoj de Heym. Ja la juna eldonisto Rowohlt⁴ eldonis liajn poemojn. Post nelonge devintus aperi liaj rakontoj. Nur en *Berlina Tagĵurnalo* post la raporto pri la akcidento estis mencio, ke la droninto ankaŭ aktivis literature kaj antaŭnelonge aperigis volumon da poemoj *La eterna tago*. Spuroj de bela talento estis rimarkablaj. Spuroj! Ridinda estas tio.

Ni de la akvoadministracio partoprenis la serĉadon de la kadavro. Miaj kolegoj ja mokis min, kiam mi konstatis, ke liaj poemoj estis “terure eminentaj” kaj citis liajn plej freŝajn versojn: “La homoj staras fronte en la stratoj / kaj gapas al la gravaj ĉiel-markoj”, — tamen ili ne laciĝis jen kaj jen haki truojn en la glacio de Havel kaj per la tiel nomataj mortoankroj traserĉi la grundon. Kaj mi, apenaŭ reveninte al Potsdamo, verkis la poemon *Mortoankro*, dediĉe al Heym, kiun Pfemfert komence volis aperigi, sed poste resendis ĝin kun bedaŭro al mi.

Je unu jaro pli junan Balcke, kiel rapidis notici la *Krucĵurnalo*, rimarkis fiŝkaptisto tra la glacio en Havel. Li hakis truon en la glacio kaj prenis la kadavron per ŝiphoko. Balcke aspektis paca. Sed Heym altiris, kiel embrio, la piedojn al la korpo. Konvulsia, la vizaĝo distordita, la manoj frotvunditaj. Kun



sketŝuoj sur la piedoj li kuŝis sur la krustiĝinta glacio. Nur de ekstere li estis fortika bubo, sed interne li estis disŝirata de la konflikto inter diversaj volo. Li, kiu abomenis ĉion armean, kelkajn semajnojn antaŭ la morto kandidatiĝis kiel volontulo ĉe la unua Alzaca infanteria regimento en Metz⁵. Samtempe li estis plena de planoj en tute alia direkto. Li volis, kiel mi scias, verki dramojn...

Tradukis el la germana
Wolfgang Kirschstein

Notoj

Grass nur pale redonas la sintenon de la generacio antaŭ la Unua Mondmilito, kiu abomenis la burĝajn valorojn. Kelkaj (ankaŭ la fikcia rakontanto de 1912) atendis la militon por forigi la malnovan ordon, sed kiam okazis la milito, ili spertis, ke la reala kaj literatura hororoj estas malsamaj aferoj. Apokalipso kaj morto estis centraj temoj de tiuj verkistoj, kiel montras la titolo de la antologio *La krepusko de l' homaro* (1920).

1. La Nova Klubo estis fondita en 1909. Georg Heym (1887-1912), aŭtoro de ĉ. 500 poemoj, aperis en la klubo en 1910. Ernst Balcke (1887-1912) ankaŭ havis kontaktojn kun tiu klubo. La *Novpatosa Kabaredo* kreskis el tiu klubo. Ernst Blass (1890-1939) kaj Alfred Wolfenstein (1888-1945) verkis en ekspresionisma stilo.

2. *L'Ago*, redaktita de Franz Pfemfert (1879-1954), aperis inter 1911 kaj 1932. La redakcia linio estis maldekstre de la socialdemokratoj.

3. La dua krizo en Maroko okazis en 1911 kaj estis plia paŝo de la Germana Regno al la Unua Mondmilito.

4. Ernst Rowohlt (1887-1960) fondis gravan eldonejon.

5. Alzaco de 1871 ĝis 1919 estis sub la administrado de Germanio.

Zamenhof (1859-1917) ĉu nia unua poeto?

Ĉiu movado, kiu socie fariĝas eĉ iom influa, tre baldaŭ formas al si sian propran “mitologion”, minimume por la propra membraro. Ankaŭ la Esperanto-movado faris al si tian fondohistorion; unu el ĝiaj plej konataj vortigantoj estas Edmond Privat kun sia *Vivo de Zamenhof* (1920).

De ekstre Zamenhof al multaj samtempuloj supozeble impresis kiel revulo, neglektinda laŭ la plimulto — sed li daŭrigis. En nia Esperanto-mitologio li fariĝis la milda okulkuracisto, kiu vartis siajn malriĉajn pacientojn. Sed ne certas, ke tion li elektis pro altruismo — povas esti, ke kiel “iom fremda homo” li ne trovis pli bone pagatan lokon. Cito el lia letero al Bolingbroke Mudie de 27 jan 1914: “mi volas konservi mian liberecon; ankaŭ mi ne povas — per forpuŝo de mia tre malfacile akirita medicina klientaro — elmeti al grandega danĝero la tutan estontecon de mia familio” (Orig 3, p. 2638-2639). Tio montras ke Zamenhof povis malfacile trovi klientaron. Kiel ajn — li daŭrigis.

Por mi persone recipe tiu “l’ obstino, l’ espero kaj la pacienco” karakterizas lian agadon. Mem laŭsperte sciante kiom da obstino necesas por sistema traduklaboro super grandaj projektoj, mi nur povas admiri lin. Sed li faris multe pli ol nur tion: Zamenhof inspiris kaj grandparte administris la estiĝantan movadon. Pensu pri la *Adresaroj* kiujn regule li aperigis pri novaj esperantistoj. Pensu pri la multaj leteroj kiuj restas de li en la mirinda kolekto de Itô Kanzi — la trivoluma originalaro (Orig), foje mendoj de unuopuloj pri broŝuroj aŭ libroj, foje eĉ konteltiroj.

Unu el liaj ĉefaj poemoj miatakse estas *La Vojo*, teksto en la bona tradicio de la sociaj movadoj: teksto lingve sufiĉe nekomplika, tre taŭga por entuziasmigi la membrojn de la propra grupo. Tiaj himnoj aperis ĉu en eklezioj, ĉu en socialismo, ĉu alimovade.

La Vojo

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l’ sorto, nek moko de
l’ homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj’ elektita.



Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L’ espero, l’ obstino kaj la pacienco –
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l’ tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj
perdiĝas, –
Ni semas kaj semas konstante.
“Ho, ĉesu!” mokante la homoj
admonas, –
“Ne ĉesu, ne ĉesu!” en kor’ al ni sonas:
“Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos”.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigita,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel’ unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L’ espero, l’ obstino kaj la pacienco –
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.
(1896)

Zamenhof supozeble ne mem konsideris sin serioza poeto. Tamen, lia poeteco troviĝis dise en lia agado: En siaj fruaj jaroj, inter 1879-81 li okupiĝis pri gramatiko de la jida lingvo. Ĉe tio li ankaŭ aldonis kelkajn poemojn por montri la plej oftajn metrikojn (La tradukon vidu en Orig 1, p. 23). La nura

fakto, ke tiujn li aldonis, jam montras ke kiel ajn la nocio poemverkado por li gravis. Alie li ne enmetus tion en bazan gramatikon pri tiu lingvo.

Fakte, ankaŭ en la diversaj formoj de Praesperantoj li verkis poemojn; fama estas lia “Lingwe Uniwersala”:

Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp’ está.
La tot’ homoze in familje
Konunigare so debá.

Kiel ajn, sen ia hezito oni povas konstati, ke por Zamenhof ne estis sencele okupiĝi pri lingvo internacia, se en ĝi ne eblus verki ankaŭ poezie. La poezio mem miaopinie kunkreis la lingvon. Bedaŭrinde mi ne retrovas, kiu unua diris, ke Zamenhof eble ne estas granda poeto en siaj versoj, sed lia lingvo mem estas granda artverko. Mi plene konsentas.

Parolante pri aŭtoro kiel poeto, kutime oni ne atentigas tradukaĵojn. Tamen, certe en tiel frua periodo de nia lingvo tradukoj estas ege gravaj. Ekzemple ni rigardu iom la fabelon “Abocolibro” — en la eldono de 1990 je p. 567. Ni vidas, ke Zamenhof tute ne tradukis ekzakte. Li faris proprajn poemojn el la vers-paroj. Ekzemple:

A. Abelo

Abelo ĉiam zumas, zumas,
Kaj sian devon ĝi plenumas.

B. Baleno

Baleno en la oceano
Elspiras akvon per fontano.

C. Citrono

Citrono estas frukto flava,
Agrabla, kvankam acidhava.

Resume: ni ne sanktigu nian Zamenhofon. Sed ni ja malkaŝe rekonu, ke lia lingvo estas mirinda poezia ilo, taŭga por ĉiuj uzoj. Dank’ al lia obstino kaj pacienco!

Gerrit Berveling

La rubriko *Nia trezoro* celas tiujn, kiuj jam senprobleme legas en Esperanto, sed ankoraŭ ne bone konas ties historian kaj kulturalan fonon. En la 2008a jaro en *Nia trezoro* estis prezentitaj dek libroj, kiuj grave influis la evoluon de Esperanto lingve, socie kaj kulture. En la 2009a jaro, la jaro de la centjariĝo de *La Ondo de Esperanto*, la rubriko prezentis la Esperantan gazetaron per artikoloj pri dek gravaj Esperanto-gazetoj. En la 2010a jaro en *Nia trezoro* aperis artikolserio pri la plej gravaj romanoj originale verkitaj en Esperanto, kaj pasintjare en la fokuso estis Esperanto-eldonejoj.

Ĉi-jare ni prezentos la plej interesajn Esperanto-poetojn.

Du Novjarfestaj rakontoj

de Anton Ĉeĥov

Friponoj kontraŭvole (Novjara blagaĵo)

En la hejmo de Zakario Kuzmiĉ Djadeĉkin okazas vespera festo. Oni celebras la Novjaron kaj gratulas la mastrinon Melanja Tiĥonovna okaze de ŝia nomtago.

Gastoj multas. La publiko estas respektinda, solida, sobra kaj pozitiva. Neniu kanajlo. La vizaĝoj montras admiron, agrablon kaj dignon. En la salono sur granda sofo sidas la loĝejmastro Gusev kaj la butikisto Razmaĥalov, de kiu la familio Djadeĉkin aĉetas kredite. Ili rezonas pri fianĉoj kaj filinoj.

— Nune malfacilas trovi la homon, — diras Gusev, — kiu estas nedrinkema kaj serioza... homo kiu estas laboranta... Malfacilas!

— La ĉefa afero en la hejmo estas — ordo, Aleksio Vasiljiĉ! Tio ne estos, se en la hejmo ne estos tiu... kiu... en hejmo ordo.

— Se ordo mankas en la hejmo, do... ĉio tiele... Da stultaĵoj multas en ĉi mondo... De kie la ordo venos? Hm...

Apud ili sur seĝoj sidas tri maljunulinoj kaj admire rigardas al iliaj buŝoj. En la okuloj legeblas miro pri la "saĝo kaj sagaco". En angulo Guriĵ Markoviĉ, la baptopatro de la infanoj de la gemastroj, rigardas al ikonoj. En la dormoĉambro aŭdeblas bruo. Tie sinjoridoj ludas loton¹. La vetsumo estas unu kopeko. Ĉe la tablo staras kaj ploras gimnaziano de la unua lernoĵaro Kolĵa. Li volus ludi, sed oni ne lasas lin al la tablo. Ĉu li kulpas, ke li estas tro malgranda kaj ne havas kopekon?

— Ne ploraĉu, stultulo! — oni admonas lin. — Nu, kial ci ploraĉas? Ĉu volas, ke patrino verĝu cin?

— Kiu tie ploras? Ĉu Kolĉjo? — aŭdeblas patrino voĉo el la kuirejo. — Ne sufiĉe mi lin batis, aĉulon... Barbara Gurjevna, pinĉu lian oreleon!

Sur la gesinjora lito, kovrita per paliĝinta indiana tuko, sidas du fraŭlinoj en rozkoloraj roboj. Antaŭ ili staras Kopajskij, eble dudektrijara junulo servanta en asekurkompanio, *en face*² tre simila al kato. Li amindumas.

— Mi ne planas edziĝi, — li memadmire diras, fortirante per fingre la altan akran kolumon disde la kolo. — La virino estas lumanta punkto en homa menso, sed ŝi povas pereigi homon. Malica estaĵo!

— Sed la viroj? La viro ne povas ami. Faras ĉiajn krudaĵojn.

— Kiom vi naivas! Mi ne estas cinikulo nek skeptikulo, tamen mi komprenas, ke la viro ĉiame staros en plialta punkto rilate sentojn.

El angulo en angulon, kvazaŭ lupoj en kaĝo, paŝadas Djadeĉkin mem kaj lia pliaĝa filo Griŝa. Iliaj animoj brulas. Dum la tagmanĝo ili forte drinkis kaj nun deziras refreŝiĝi. Djadeĉkin iras en la kuirejon. Tie la mastrino ŝutas sukeran pulvoron sur kukon.

— Melinjo, — diras Djadeĉkin. — Tempas porti zakuskojn. Gastoj ŝatus manĝeti...

— Ili atendu. Vi tuj drinkos kaj manĝos ĉion, sed kion mi proponos je la noktomezo? Ne mortos vi. Iru for... Ne tumultu antaŭ mi!

— Nur po glaseto, Melinjo... Nenian deficiton vi pro tio spertos... Ĉu?

— Jen mia puno! Iru for, mi al vi diras! Sidu kun la gastoj! Kial vi umas en la kuirejo?

Djadeĉkin profunde suspiras kaj eliras el la kuirejo. Li iras rigardi la horloĝon. Ĝi montras ok minutojn post la dekunua. Ĝis la dezirata momento restas kvindek du minutoj. Terure! La atendado de drinko estas la plej peza el inter ĉiuj atendadoj. Preferindas dum kvin horoj atendi trajnon en frostoj, ol dum kvin minutoj atendi drinkon... Djadeĉkin rigardas la horloĝon kun malamego



kaj, iom paŝinte tien-reen, movas la grandan montrilon je kvin minutoj antaŭen...

Kaj Griŝa? Se oni nun ne lasos lin drinki, li iros en restoracion kaj drinkos tie. Morti pro enuo li ne konsentas...

— Panjo, — li diras, — la gastoj koleras, ke vi ne donas manĝaĵojn! Estas vera fiaĵo... Mortigi nin per malsato!.. Donu po glaseto bonvole! — Atendu... Malmulte restis... Baldaŭ jam... Ne umu en la kuirejo.

Griŝa frapas per la pordo kaj iras por centan fojon rigardi la horloĝon. La granda montrilo estas senkompata! Ĝi restas preskaŭ sur sama loko.

— Ĝi malfruas! — Griŝa konsolas sin kaj per sia fingro movas la montrilon antaŭen je sep minutoj.

Kolĵa kuras preter la horloĝo. Li haltas antaŭ ĝi kaj komencas kalkuli tempon... Li treege volas plej baldaŭ ĝisvivi la momenton, kiam oni krios "hura!" La montrilo per sia senmoveco pikas lin en la koron. Li surgrimpas seĝon, timeme ĉirkaŭrigardas kaj ŝtelas kvin minutojn de la eterno.

— Iru, rigardu, *quelle heure est-il*³? — unu el la fraŭlinoj ordonas al Kopajskij. — Mi mortas pro senpacienco. Ja estas Nova jaro! Nova feliĉo!

Kopajskij riverencas, ŝovas ambaŭ piedojn sur la planko kaj rapidas al la horloĝo.

— Diablo prenu, — li balbutas, rigardante la montrilojn. — Kiom longe ankoraŭ! Kaj manĝaĉi mi terure volas... Katinjon mi tutnepre kisas, kiam oni huras.

Kopajskij deiras de la horloĝo, haltas... Iom meditinte, li revenas kaj mallongigas la malnovan jaron je ses minutoj. Djadeĉkin trinkas du

glasojn da akvo, sed... brulas la animo! Li paŝas, paŝas, paŝadas... La edzino jen kaj jen pelas lin for el la kuirejo. La boteloj, starantaj sur fenestrobreto, ŝiras lian animon. Kion fari! Mankas fortoj por pacienci! Li refoje kaptas la lastan rimeдон. La horloĝo estas je lia dispono. Li iras en la infanĉambron, kie pendas la horloĝo, kaj trafas la vidaĵon, malagrablan por lia patra koro: antaŭ la horloĝo staras Griŝa kaj movas la montrilon.

— Vi... vi... vi kion tie faras? Ha? Kiucele vi movis la montrilon? Stultulo vi estas! Ha? Kial tio? Ha?

Djadeĉkin tudas, hezitas, terure grimacas kaj svingas sian manon.

— Kial? Ha-a-a... Ja movu ĝin, ke ĝi mortiĝu, kanajla! — li diras kaj, forpuŝinte la filon de la horloĝo, movas la montrilon.

Ĝis la Novjaro restas dek unu minutoj. La patro kaj Griŝa iras en la salonon kaj komencas prepari la tablon.

— Melinjo! — krias Djadeĉkin. — Tujas Novjaro!

Melanja Tiĥonovna elkuras el la kuirejo kaj iras kontroli la edzon... Ŝi longe rigardas la horloĝon: la edzo ne mensogas.

— Nu kion fari nun? — ŝi frustras. — Sed ja pizoj por ŝinko ankoraŭ ne kuiriĝis! Hm. Jen puno. Kiel mi surtabligos?

Kaj, iom pensinte, Melanja Tiĥonovna per sia tremanta mano movas malantaŭen la grandan montrilon. La malnova jaro rericivas dudek minutojn.

— Ili atendu! — diras la mastrino kaj kuras en la kuirejon.

Tradukis el la rusa
Valentin Melnikov

Notoj

1. Loto (R лото, A lotto, F loto). Ludo, en kiu ludantoj sur siaj ludkartoj kovras numerojn aŭ bildojn, kiujn unu el la ludantoj hazarde prenas el sako kaj laŭte anoncas. Ĉi tiu ludo estas priskribita ankaŭ en la rakonto *Infanoj* de Ĉeĥov, en kiu estas plena frazo el *Fripornoj*. (*Infanoj* en la Esperanta traduko de Aleksander Korĵenkov aperis en *La Ondo de Esperanto*, 2004, №3).

2. **En face** (*fr.*). Aspekto de vizaĝo rekte (ne profile) rigardata.

3. **Quelle heure est-il?** (*fr.*). Kioma horo estas nun?

Liberalulo (Novjara rakonto)

Belegan kaj admirindan bildon prezentis la homaro en la unua tago de la nova jaro. Ĉiuj ĝojis, jubilis, gratulis unu la alian. En la aero sonis plej sinceraj kaj koraj bondeziroj. Ĉiuj estis feliĉaj kaj kontentaj.

Nur la gubernia sekretario Komprenov estis malkontenta. En la novjara tagmezo li staris sur unu el la ĉefurbaj stratoj kaj protestis. Ĉirkaŭpreninte per la dekstra brako lanternofoston, kaj per la maldekstra forskuante ion nekompreneblan, li balbutis aferojn nepardon-eblajn kaj puneblajn... Apud li staris lia edzino kaj tiris lin je maniko. Ŝia larmoplena vizaĝo esprimis malĝojon.

— Idolo! — ŝi diris. — Puno mia! Okuloj viaj senhontaj, mahametulo! Iru, mi al vi diras! Iru, dum restas tempo, kaj subskribu! Iru, ebria muzelaĉo!

— Neniakaze! Mi estas klera homo kaj ne deziras obei al sovaĝeco. Iru vi mem por subskribi, se vi volas, sed min lasu!.. Mi ne deziras esti sklavo.

— Iru! Se vi ne subskribos, estos malbono al vi! Oni forpelos vin, kanajlo, kaj tiam ĉu mi mortu pro malsato? Iru, hundaĉo!

— Estu tiel... Do mi pereos... Ĉu por la vero? Ja eĉ tuj!

Komprenov levis la manon, por svinge forpuŝi la edzinon, kaj desegnis per ĝi enaere duonrondon... Preteriranta distrikta policisto en nova mantelo haltis por sekundo kaj, turnante sin al Komprenov, diris:

— Hontu! Bonvolu konduki laŭ la ekzemplo de la ceteraj personoj!

Komprenov sentis rimorsojn. Li honteme ekpalpebrumis kaj forprenis la manon disde la lanternofosto. La edzino profitis tiun momenton kaj ektiris lin je maniko laŭ la strato, zorgeme evitante ĉion, al kio oni povus sin kroĉi. Post ne pli ol dek minutoj ŝi altrenis la edzon al la dom-enirejo de lia estro.

— Nu, iru, Aleĉjo! — ŝi tenere diris, kondukinte la edzon sur la peronon. — Iru, Aleĉjeto! Nur subskribu kaj revenu. Kaj mi pro tio al vi aĉetos konjakon por temanĝo. Ne skoldos vin, kiam vi ebriiĝos. Ne pereigu min, orfinon!

— Haaa... hm... Ĝi, do, estas lia domo? Perfekte! Bonege! Tuj ni subskribos, diablo prenu! Ni tiel subskribos, ke li longe memoros! Ĉion mi al li skribos sur tiu papero! Mi skribos mian opinion! Kaj poste — li min pelu! Kaj estos via kulpo, se li min forpelos! Via!

Komprenov ŝanceliĝis, puŝis la pordon perŝultre kaj brue eniris. Tie ĉe la pordo staris la pordisto Jegor kun freŝe razita, novjara fizionomio. Ĉe tableto kun paperfolio staris Vezuviev kaj Nigraporkov, la kolegoj de Komprenov. La alta kaj magra Vezuviev estis subskribanta, kaj Nigraporkov, malgranda variolmakulita hometo, atendis sian vicon. Sur la vizaĝoj de ambaŭ estis skribite: "Feliĉan Novjaron!" Videblis, ke ili estis subskribantaj ne nur fizike, sed ankaŭ morale. Vidinte ilin, Komprenov malŝate ridetaĉis kaj kun indigno volvis sin en la peltaĵon.

— Certe! — li ekparolis. — Certe! Ĉu eblas ne gratuli lian moŝton? Ne eblas ne gratuli! Ha, ha! Necesas esprimi siajn sklavajn sentojn!

Vezuviev kaj Nigraporkov mire rigardis al li. Neniam en la vivo ili aŭdis tiajn vortojn!

— Ĉu tio ne estas malklereco, servilemo? — daŭrigis Komprenov. — Ĉesu, ne subskribu! Esprimu proteston!

Li pugnofrapis la folion kaj disŝmiris la subskribon de Vezuviev.

— Vi ribelas, via moŝto! — diris Jegor, saltinte al la tablo kaj levinte la folion super la kapo. — Pro tio, moŝto, oni vin povos... ĉu vi scias, kiel?

Tiam la pordo malfermiĝis, kaj en la domon eniris alta aĝa viro en ursofela peltaĵo kaj orumita triangula ĉapelo. Tiu estis Veleleptov, la estro de Komprenov. Ĉe lia eniro Jegor, Vezuviev kaj Nigraporkov tuj kramfe rektiĝis. Ankaŭ Komprenov rektiĝis, sed rikanis kaj ektordis lipharon.

— Ha! — diris Veleleptov, vidinte la oficistojn. — Vi estas... ĉi tie? Hm... jes... amikoj... Kompreneble... (evidente, lia ekscelenca moŝto estis ebrieta). Kompreneble... Ankaŭ al vi gratulon... Dankon, ke vi ne forgesis... Dankon... Hmm... Estas agrable vidi... Mi deziras al vi... Kaj vi, Komprenov, ĉu jam trempiĝis? Ne gravas, ne konfuziĝu... Drinku, sed saĝon ne perdu... Ĉiuj drinku kaj gaju...

— Ĉia ŝtono por homa bono, via moŝto! — riskis enmeti Vezuviev.

— Nu jes, kompreneble... Kiel vi diris? Kie ŝtono? Nu, iru do... kun dia beno... Aŭ ne... Ĉu vi jam faris viziton al Nikita Proĥoroviĉ? Ĉu ankoraŭ ne? Bonege. Mi donos al vi librojn... portu al li... Li donis al mi legi du jarkolektojn de “Migranto”... Do ĝin necesas reporti... Iru kun mi, mi al vi donos... Demetu la paltojn!

La oficistoj demetis siajn paltojn kaj iris post Veleleptov. Komence ili eniris en la akceptejon kaj poste en grandan, lukse ornamitan salonon, kie ĉe ronda tablo sidis la general-edzino mem. Ambaŭflanke de ŝi sidis du junaj damoj, unu surhavis blankajn gantojn, la alia nigrajn. Veleleptov lasis la oficistojn en la salono kaj iris en sian kabineton. La oficistoj perpleksiĝis.

Dum ĉirkaŭ dek minutoj ili staris silente, ne moviĝante kaj ne sciante, kion fari per la manoj. La sinjorinoj interparolis france kaj jen kaj jen levis al ili la okulojn... Turmento! Finfine el la kabineto aperis Veleleptov, tenante grandan faskon da libroj en ĉiu mano.

— Jen, — li diris. — Transdonu al li kaj danku... Tio estas “Migranto”. Mi fojfoje legis vespere... Kaj al vi... dankon, ke vi ne forgesis... venis por omaĝi... Ĉu vi miajn oficistojn rigardas? — Veleleptov turnis sin al la damoj. — He, he... Rigardu, rigardu... Ĉi tiu estas Vezuviev, ĉi tiu — Nigraporkov... kaj ĉi tiu estas mia Komprenov. Foje mi eniris en la

deĵorejon, kaj li, tiu Komprenov tie maŝinon rolis. Jen kia! Pŝ! pŝ! pŝ! Fajfas, per la piedoj frapas... Tiel nature aspektis... Hmm, jes... Nu, prezentu! Montru al ni.

La sinjorinoj fiksas siajn rigardojn al Komprenov kaj ridetis. Li tusetis.

— Mi ne scipovas... Mi forgesis, via ekscelenco... — li balbutis. — Mi ne povas kaj ne volas.

— Ne volas? — miris Veleleptov. — Ĉu? Bedaŭrinde. Ne povas vi respekti la oldulon... Adiaŭ... Domaĝe... Iru...

Vezuviev kaj Nigraporkov puŝis la flankon de Komprenov. Kaj li jam mem ektimis sian rifuzon. Antaŭ liaj okuloj ĉio kirliĝis... Nigraj gantoj miksiĝis kun la blankaj, la vizaĝoj tordiĝis, la mebloj eksaltis, kaj mem Veleleptov transformiĝis en grandan ordonantan fingron. Iom starinte kaj ion balbutinte, Komprenov alpremias “Migranton” al la brusto kaj eliris straten. Tie li ekvidis sian edzinon, palan kaj tremantan pro malvarmo kaj timego. Vezuviev kaj Nigraporkov jam staris apud ŝi kaj, forte gestante per manoj, samtempe rakontis ion teruran al ambaŭ ŝiaj oreloj. “Kio okazos?!” — legeblis en iliaj figuroj kaj movoj. Komprenov, senespere rigardante la edzinon, ekiraciis kun la libroj post la kamaradoj.

Reveninte hejmen, li ne tagmanĝis kaj ne trinkis teon... Nokte lin vekis koŝmaro.

Li ekstaris kaj rigardis en mal-lumon. Nigraj kaj blankaj gantoj,

vangoharoj de Veleleptov, ĉio ĉi ekdancis antaŭ liaj okuloj, turniĝis, kaj li rememoris la okazinton.

— Bruto mi estas, bruto! — li grumblis. — Protestu, azeno, se vi volas, sed ne aŭdacu ne estimi la superulojn! Ĉu malfacilis prezenti maŝinon?

Li ne plu povis ekdormi. La tutan nokton ĝis la mateno lin turmentis rimorsoj, angoro kaj plorĝemoj de la edzino. Rigardinte matene en spegulon, li ekvidis ne sin mem, sed fremdan fizionomion, palan, malgrasan, tristan...

— Mi ne iros al la oficejo! — li decidis. — Tutegale... La sama fino!

La tutan duan tagon de la nova jaro li dediĉis al paŝado inter la ĉambroanguloj.

Li paŝadis, suspiris kaj pensis: — Ĉe kiu eblus trovis revolveron? Ol tiel vivi, pli bonas... ja vere... Kuglon en la frunton, kaj fin’...

En la tria tago li pro la angoro fuĝis al la oficejo.

“Kio okazos?!” — pensis ĉiuj oficistoj, rigardante lin de malantaŭ siaj inkujoj.

Same pensis ankaŭ Komprenov.

— Do kio? — li flustris al Vezuviev. — Li forpelu! Al li mem malbonos, se mi senigos min je vivo.

Je la 11a horo venis Veleleptov. Irante preter Komprenov kaj vidinte lian palan, forte maldikiĝintan, timigitan vizaĝon, li haltis, kapbalancis kaj diris:

— Ja forte vi tiam kaptis, frato! Ĝis nun la muzelo ne reenkadriĝis. Necesas esti pli modera, amiko... Malbone... Ĉu malfacilas la sanon perdi?

Kaj, frapinte la ŝultron de Komprenov, Veleleptov iris plu.

“Ĉu nur tio?!” — ekpensis la tuta kolektivo.

Komprenov ekridis pro plezuro. Eĉ pepis birde — tiel agrable al li estis! Sed baldaŭ lia vizaĝo ŝanĝiĝis... Li serioziĝis kaj montris malestimman grimacon.

— Estas via feliĉo, ke tiam mi estis ebria! — li grumblis, postrigardante al Veleleptov. — Via feliĉo, alikaze... Ĉu vi memoras, Vezuviev, kiel mi lin forbatis?

Reveninte el la oficejo hejmen, Komprenov tagmanĝis kun granda apetito.

Tradukis el la rusa
Valentin Melnikov

Konstantin Juon. “Ponto super la rivero Moskvo”



Ĉu nova UEA estas bezonata?

Derks, Johan. *Gvidlibreto por Komitatoj*. 2011. — Zajeĉar: Derks, 2011. — 28 p., il.

“Krizo en UEA”, — ĉi tiun esprimon mi aŭdas dum tiom da tempo, kiom mi konscias, kio reale estas tiu organizo, en kiu mi membras dum jardekoj. Kaj mi iom konas la historion de la Esperanto-movado, pro kio mi scias, ke tiaj (kaj pli profundaj) “krizoj” ekzistis ankaŭ multe pli frue. Sekve, la “kriza” stato estas normala stato de UEA.

Plendoj pri nedemokrateco de UEA ekzistas same longe. (Parenteze: tio same koncernas la landan asocion, en kiu mi membras, malgraŭ tio, ke la reguloj de ĝia funkciado estas pli demokratiaj ol tiuj de UEA — do, ĉiu Esperanto-asocio funkcias en stato de konstanta krizo!) La Estraro konfliktas kun CO, la komisionoj estas neglektataj, apartaj komitatoj, estraranoj kaj oficistoj estas traktataj malafable, kaj (preskaŭ) ĉie regas ĥaoso. Oni bezonas drastajn reformojn por ricevi novan, bone funkciantan UEA, kiu, akompanate de tamburoj kaj trumpetoj, rapide atingos la celon en gloro.

La broŝuro de Johan Derks *Gvidlibreto por Komitatoj* celas priskribi la nunajn malbonaĵojn de la Estraro sub la prezido de Probal Dasgupta, mobilizi la “sanajn fortojn” en la Komitato por rompi la situacion kaj ricevi la novan, bone funkciantan ordon. Krom abundaj citaĵoj el diversaj diskutoj, kiuj ilustras la nunan malbonan gvidadon, pro kiu la plibonigaj proponoj ne estas akceptataj, la broŝuro enhavas ankaŭ kolekteton de artikoloj de kelkaj famuloj kun certaj reformproponoj. Do, la aŭtoro ne estas nur grumblanta solulo...

Estas bone, ke la libro jam en la titolo turnas sin al la komitatoj (kvankam ĝia publikigo paperforme montras esperon je apogo de “simplaj” membroj). Tamen mi supozas, ke nur malmultaj dividos la patoson de la aŭtoro — la Komitato kaj la Estraro estas ne perfektaj, sed ili ja funkcias, kaj neniu povas antaŭvidi, ĉu ili funkcios pli bone post plej saĝaj ŝanĝoj. Tial tiuj, kiuj sentas realan neceson de reformoj en la laboro de UEA, legos ĝin kun utilo, ĉiuj ceteraj — kun pli aŭ malpli granda intereso. Sed mi supozas, ke revolucio en Esperantio en proksima tempo ne okazos — ja almenaŭ mi ne sentas la realan bezonon por ĝi.

Nikolao Gudskov

Pli danca, ol kanta

Kapriol! *Aventur'*: KD. — Terband: TRbandstudio, 2009.

La grupo *Kapriol'!* aperis en 2009, kaj de tiu tempo ĝi prezentis sin multfoje en Esperanto-aranĝoj (interalie, en KEF, FESTO kaj ARKONES). La kvaropo prezentas tradiciajn kaj tradicisimilajn nederlandajn dancojn kaj kantojn (ankaŭ originalajn, t. e. memverkitaĵojn).



Por bone imagi la ĝeneralan sonon de la muziko rememoru la kantojn de *Kajto* — vi ricevos sufiĉe ĝustan impreson (tio ne mirindas, ja du membroj de *Kapriol'!* — Marita Kruijswijk kaj Marian Nesse — antaŭe ludis en *Kajto*). Laŭ la asertoj de la grupanoj mem, “ili ludas kaj malnovan muzikon per novaj muzikiloj kaj memfaritan muzikon per malnovaj muzikiloj” — kaj tio estas absolute vera, almenaŭ koncerne ĉi tiun diskon, ĉar kelkaj ĝiaj fragmentoj prezentas, fakte, bizaran miksaĵon inter modernaj kaj tradiciaj melodioj kaj ritmoj; ankaŭ kombino de akordiono kaj diversaj ŝalmoj/flutoj kun moderna (sed modera!) drumo sonas iom neordinare.

Entute la albumo enhavas 13 pecojn. Du el ili estas al mi bone konataj — tio estas la kantoj *Soleco* kaj *Tosto* el la albumo *Flugdrako* de *Kajto*, tamen en iom plibeligita muzikaranĝo. La reston mi aŭskultis kun sufiĉa intereso. La unua (senteksta kaj originala) komponaĵo, priskribita kiel la tradicia danco bureo, sonas peze kaj iom preme malgraŭ la preskaŭ marŝa ritmo. La dua muzikpeco prezentas la tradician dancon skotiŝo kun moderna — eĉ Esperanto-rilata — teksto; ĝi sonas gaje kaj eĉ

petole. La tria peco prezentas iom sombran tradician dancon andro; ĝia teksto temas pri tio, ke “sen aventur’ la vivo estas vana nur”. La kvara peco denove estas senteksta kaj originala — kvietaj valso, iom post iom transformiĝanta al minora polko. La kvina peco (originala) iom elfalas el la ĉefa stilo de la disko — ĝi sonas preskaŭ kiel moderna populara lirika kanto (se ne konsideri la tradician muzikan veston). La sesa peco (tradicia skotiŝo) komence sonas tre originale (preskaŭ psikedele, se uzi modernan slangaĵon) pro la uzo de iu malofta tipo de flutoj; poste la flutojn anstataŭas basgitaro kun multaj sinkopoj, sed finfine ĉio revenas al “normala” popola muziko akompanata de sensenca silabado. Post la jam menciita *Soleco* sonas senteksta originalaĵo, prezentanta neatenditan miksaĵon de harmonioj kaj melodioj modernaj kaj popolaj. Naŭe sonas popolstila originalaĵo sufiĉe plaĉa por la orelo. Sekvas du muzikpecoj, originala kaj tradicia (ambaŭ sentekstaj); kronas la albumon la jam menciita *Tosto* kaj ĉarma 3-partia kanon-kantado.


Evidentas do, ke la albumo rezultis ege pli danca, ol kanta — ses pecoj el 13 estas tute sentekstaj, en ĉiuj ceteraj la tekstoj estas relative mallongaj kaj abunde diluitaj de la muzikaj intervenoj. La malmultaj tekstoj malgraŭ sia simpleco foj-de-foje iom lamas sence kaj gramatike, la vorto “ŝtormo” ial misprononcatas kiel “ŝturmo”. La elparolo de la kantistoj, kompanse, estas tre bela kaj klara. La tekstolibreto enhavas malgrandajn (eble, eĉ tro!) priskribojn de la ludataj dancoj kaj ĝeneralan prezenton de la grupo. La muzikaj plenumoj, aranĝoj kaj registrado estas laŭdindaj: ĉio, inkluzive kantadon, sonas ege ekvilibre kaj bonkvalite.

Mallonge: eĉ malgraŭ ioma seniluziigo (mi, fakte, esperis trovi sur la disko nur popolajn muzikojn sen modern-stilaj spicoj) mi estis tre pozitive impresita de la albumo — la neordinara plektaĵo de la tradicia kaj moderna artoj ja sonas sufiĉe “popole” kaj interese. La disko certe estas rekomendinda por la ŝatantoj de tradici-stila sono, tamen ankaŭ ĉiuj aliaj muzikemuloj trovos sur ĝi interesan kaj originalan muzikan materialon.

Paŭlo Moĵajev

**La abontarifo
de “La Ondo de Esperanto” en 2012
denove restas la sama. Tuj (re)abonu!**

Nova senpaga e-libro de “Sezonoj”



En la elŝutejo de *Sezonoj* aperis nova senpaga elektronika libro (e-libro) *Fjodor Dostojevskij en Esperanto* de Aleksander Korĵenkov.

Kiel prelego ĝi estis unuafoje prezentita la 15an de julio 2002 en la lanĉo de la novelaro *Blankaj noktoj* de Dostojevskij kadre de la 1a Balta Esperanto-Forumo en Kaliningrado. Poste ĝi estis legita en Poznano (Pollando), Glasgovo (Skotlando), Kaŭno kaj Birŝtonas (Litovio), kaj en Sabadell (Katalunio). Ĝi aperis, iom reduktite, en *La Brita Esperantisto* (aŭtuno 2003, №955). En 2005 la prelegoteksto estis eldonita kiel la dua kajero en la kleriga serio *Sed ne el katedro*. Ĉe la pretigo de la elektronika eldono la aŭtoro iom ampleksigis la komencan (biografian) parton.

Same kiel ĉiuj eroj de la serio *Sed ne el katedro*, ĉi tiu eseo estas kleriga, ne scienca. Ĝi nur celas rakonti al la ĝenerala esperantista legantaro (ne al literaturologoj kaj kritikistoj) pri la ĉefaj vivoŝtupoj de Fjodor Dostojevskij kaj prezenti ĉefajn specifajn erojn de la stilo de Dostojevskij kaj ilian transdonon en Esperanto.

La nova e-libro enhavas ankaŭ la novelon de Dostojevskij *La kampulo Marej* kaj bibliografion de verkoj de Fjodor Dostojevskij, eldonitaj en Esperanto. Ĝi estas la dek-dua eldonaĵo en la e-libra kolekto de *Sezonoj* kaj la oka ero en la serio *Virtuala Biblioteko*.

Ĝi estas senpage elŝutebla en la formatoj (prezentomanieroj, dosierformoj) pdf (por poretebla aŭ surtabla komputilo) kaj epub (por e-legilo): <http://esperanto.org/Ondo/Libro/Libro.php>

La e-libroj de *Sezonoj* estas destinitaj por privata legado, ne por pludistribuo. Se niaj libroj plaĉas al vi, rekomendu ilin al aliaj kaj faru donaceton al la eldonejo, ekzemple, per la donacbutono PayPal en la elŝutejo.

Halina Gorecka

Ricevitaj libroj

Boŝevski, Tome; Tentov, Aristotel. *Laŭ spuroj de la skribo kaj de la lingvo de antikvaj makedonoj* / Tradukis el la makedona Boriŝa Miliĉeviĉ. — Prilep: La Progreso, 2011. — 86 p., il. — [Donaco de La Progreso].

Derks, Johan. *Gvidlibreto por komitatanoj. 2011.* — Zajeĉar: Derks, 2011. — 26 p., il. — [Recenzoekzemplero].

Makedona antologio / Kompilis Koce Solunski, Metodi Galeski; Antaŭparolo de Slobodan Mickoviĉ; Tradukis el la makedona Dalibor Brozoviĉ, Boriŝa Miliĉeviĉ, Trajko Mirĉeski, Ladislav Reĵek, Jozefo Velebit k.a. — Prilep: La Progreso: 1981. — 155 p., il.; 4000 ekz. — [Donaco de La Progreso].

Turisma Esperanto-Kalendaro por la 2011 jaro / Kompilis Andrzej Grzębowski. — Bydgoszcz: Skonpres, 2010. — 16 p., il. — 1000 ekz. — [Donaco de Esperantotur].

Бодуэн де Куртенэ, Иван Александрович. *Языковедение и язык: Исследования, замечания, программы лекций.* — М.: Изд-во ЛКИ, 2010. — 216 с. — (Лингвистическое наследие XX века). — [Aĉeto].

C. 157–173. Вспомогательный международный язык.

Григорьевский, Андрей. *Эсперанто: Полное описание и учебный словарь.* — М.: Импэто, 2011. — 32 с.; 1000 экз. — [Aĉeto].

Пирон, Клод; Гончарова, Ирина Германовна. *Учебник языка эсперанто: Начальный курс.* — М.: АСТ; Восток-Запад, 2007. — 193 с.; 2000 экз. — [Aĉeto].

Ricevitaj gazetoj

Esperanta Finnlando, 2011/5; *Esperanto*, 2011/11; *Femina*, 2011/27; *Ĝenerala Informilo*, 2011/169; *Informilo por interlingvistoj*, 2011/3-4; *Internaciisto*, 2011/4; *La Lanterno Azia*, 2011/11; *La Ondo de Esperanto*, 2011/12; *Norvega Esperantisto*, 2011/5; *Scienco kaj Kulturo*, 2011/5.

Pri la redaktado de *Heroldo*

(HeKo) Fine de septembro 2011 la Administra Komitato de LF-koop (KALiFo) nomumis c-inon Etel Zavadlav dumtempa redaktoro de *Heroldo de Esperanto*, kun kvinmonata provperiodo, ĝis la ĝenerala Asembleo de la kooperativo, fine de februaro 2012. La suverena instanco decidus mem pri la konfirmo de ŝia posteno, transformante ĝin al ĉefredaktoreco.



Pasis pli ol monato kaj:

a) neniam alvenis ŝia formala akcepto pri la nomumo;

b) nenio okazis rilate la redaktadon de numeroj de *Heroldo*;

c) malgraŭ pagita flugbileto, ŝi ne alvenis al Ĉaudefono, kie ŝi estis atendata por ses-semajna restado, interalie por redaktado en oportuna teknologia kadro kaj kun valora trejna asisto. Neniu klarigon ŝi donis pri la nealveno.

El la supraj KALiFo deduktas ke c-ino Zavadlav ne akceptis la postenon, por kiu ŝi kandidatiĝis libere kaj spontane, ricevante jam partan trejnadon en junio-julio 2011. Tial la postenon aŭtomate transprenos la dua kandidato en la listo, sen. Anna Bartek, kun la samaj kondiĉoj.

Marc Hiltbrand
prezidanto de KALiFo

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la novembra enigmo pri portovino venis nur kvin respondoj. La plej ĝustan kaj ampleksan sendis *Malcolm Jones* (Britio), al kiu ni sendas libropremion kaj niajn korajn gratulojn.

La ĝusta respondo estas jena:

Sinjoroj A kaj B kalkulis malbone. Ĉiu devus ricevi po 5,5 uncojn. Ĉar sinjoro B jam trinkis 3, li devus verŝi duonon de la restanta enhavo de la glaso de A — do, 2,5 uncojn — en sian glason kaj doni al sinjoro A, kiu tiam havus 5,5 uncojn por trinki.

La *Ondo* atendas viajn kontribuojn al *Mozaiko*.

Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampojn per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la ciferoj ne ripetiĝu. Viaj respondoj venu al la redakcio antaŭ la 10a de februaro 2012.

Komputile kompilis **Aleksej Korŝenkov**

9			7	2				1
	2			4			3	
			3		2			5
3	4			8			9	6
7			4		5			
	6			5			2	
8				1	6			3

Juda humuro

Ne eblas venki judon...

En Francujo antaŭ multaj jaroj antisemito eniris drinkejon kaj vidis tie iun, kiu aspektis judece. Li tuj mendis multekostan vinon por ĉiuj ĉeestantoj, escepte de la judo. Ĉiuj klientoj drinkis kun ĝojo, sed la senglasa judo aspektis same ĝoja kaj eĉ multe ridetis.

La antisemito koleriĝis kaj denove mendis vinon por ĉiuj ĉeestantoj, escepte de la judo. Sed la sama afero ripetiĝis: la judo multe ridetis kaj aspektis tre kontenta.

La antisemito ege miris kaj demandis la verŝiston:

— Kiu estas tiu ĉi judaĉo?

— La posedanto de la drinkejo.

Laboro

Du judoj sidas en publika necesejo.

Rabinoviĉ: “Kion vi pensas: ĉu tio, kion ni faras nun, estas fizika laboro aŭ intelekta?”

Bronŝtein: “Certe intelekta, ĉar se ĝi estus fizika, ni jam delonge dungus homojn por tio.

El la kolekto de **Josef Ŝemer**

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Unu granda rondo familia

Iam helpas la fortaj ... ligoj de la nuna prezidanto de E[ŭropa] E[speranto-]U[nio] ... kuzo lia ... estas prezidanto de la universitato, onklo lia ... estis 3-foje urbestro ... kaj kuzino lia ... organizis ke la urbestro ... invitis EEU kongresi tie. (Seán Ó Riain: Irlanda Ministro pri EU-Aferoj malfermos la EEU-Kongreson // *Esperanto*, 2011, №12, p. 252)

La forto de klan-destino

Oni povas klandestine viziti Kubon sed se vi havas problemojn tie, ne atendu helpon de la usona registaro!!!

(Robb Kvasnak, 8 aŭg 2011, yahoo-grupo amikaro-de-LSG, mesaĝo 4453; rimarkis Kalle Kniivilä)

Ziko, la punko

La senpaga, perreta disponigo de la verko de Ziko van Dijk estas, laŭ mi, tre bona novaĵo por ni Esperantistoj, kaj reprezentas alian strategian turniĝopunkton en la Esperanto-Movado. (Dennis Keefe, 7 nov 2011, liberafolio.org/2011/cent-jaroj-da-neutraleco#1320634997)

Esperanto, ĉu in-sekto?

aŭ: Ne necesas senkulpiko

La vendreda programo de la Pola retRadio [...] tradicie enhavas komence kulkronikon. (Barbara Pietrzak, 4 nov 2011, Facebook-grupo Amikaro de Pola Retradio en Esperanto)

Maŭzoleo restos sama

... mi ja scias, ke UEA ne preparos ŝanĝon de sia statuaro nur pro tiu mesaĝo de eta delegito kaj LA-estrarano... (Uwe Stecher, 9 okt 2011, yahoo-grupo uea-membroj, mesaĝo 19943)

En vera komunikado kunsvenas

Ĉiu lingva ago estas cerebro pri nia forcedo de la povo materie kaŭzi la deziratajn efikojn kaj pri nia forcedida povo lingvi novajn, postkaŭzadajn dezirojn. Tiu cerebro rivelas, ke la parolanto kaj la alparolato reciproke malalias. La reciproka percepto de fremdo aŭ malmemo parencas al la kaŭzata povo kaj en vera komunikado kunsvenas kun la kaŭzata povemo, lasante nur perception de du specifecoj kies komunan, meman ekziston ne disduigas ia muro de alieco. (Probal Dasgupta: En la monda tago de filozofio, Gazetara Komunikado de UEA, 2011, №433, 17 nov 2011)

Bedaŭrinde indeed

Komence de oktobro aperis rete nova bela n-ro 50 de Familia Esperanro, sed alas, dum monato kaj duono ĝi estis elŝutita nur 67 fojojn. (Anri Wandel, 17 nov 2011, listo DENASK)

Benita bunteco

Ĉi-matene, je la 7H10 mi ĉeestis, kiel kutime, katolikan diverson en najbara kvartalo. (Rafael Despradel, 1 aug 2011, yahoo-grupo landa-agado, mesaĝo 16057)

Plukis **István Ertl**

Gajan Kristnaskon!
Bonan Novan Jaron 2012!

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest

KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano

Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos, Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero México D.F., CP 07969

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630

Pollando: PEA, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa

Portugallio: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Togolando. En la unua Tutafrika Kongreso pri Kulturo (vd. p. 5) Adjé Adjévi, kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, utiligis ne nur la oficialajn kunvenojn, sed ankaŭ paŭzojn inter la programeroj por rakonti al interesatoj pri Esperanto kaj pri ties praktika uzado en la mondo. (*Adjé Adjévi*)




Skotlando. Ĉi-jare plej frue en la mondo, la 25an de novembro, la Zamenhofan Tagon festis skotaj esperantistoj (vd. p. 6). La plej juna el la festantoj, Sofia Thomson, jam komprenanta Esperanton, sur la supra foto estas inter sia patro Duncan Thomson kaj la loka organizantino Jean Bisset. (*Hju Rid*).



Hungario. Granda torto estis bakita okaze de la 35a Hungaria Esperanto-Kongreso, okazinta en fervojista kulturcentro de la urbo Szolnok de la 3a ĝis la 6a de novembro kun riĉa programo, partoprenita de 90 esperantistoj el kvar landoj: Slovakio, Rumanio, Ukrainio kaj Hungario. (*Novaĵletero de la 35a HEK*)




Fjodor Dostojevskij.
Blankaj noktoj: Ses prozaĵoj.
448 paĝoj, € 30,0.



Anton Ĉeĥov.
Ĉeriza ĝardeno: Noveloj, dramoj.
352 paĝoj, € 27,0.



Rusa Novelaro. Volumo 1
La 19a Jarcento.
400 paĝoj, € 30,0.




Samideanoj: Satiroj kaj humuraĵoj
pri Esperanto kaj pri esperantistoj.
80 paĝoj, € 7,5.



Georges Simenon.
Amiko el la junaĝo de Maigret.
128 paĝoj, € 12,0.




Trevor Steele.
Diverskoloro: Originalaj prozaĵoj.
112 paĝoj, € 10,0.



Aleksander Korĵenkov.
Historio de Esperanto.
128 paĝoj, € 12,0.



L.L. Zamenhof
Mi estas homo.
288 paĝoj, € 24,0.



Aleksandr Duliĉenko.
En la serĉado de la mondlingvo.
160 paĝoj, € 15,0.